

ESPERANTO INTERNACIA

Monata organo de la Internacia Esperanto - Ligo

Vol. 2, N-ro 11

Novembro 1938

Eldonanto : Internacia Esperanto-Ligo,
Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Adreso de la Redakcio : Teo JUNG
Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

31-a Universala Kongreso de Esperanto en Bern

Provizora programo

Sabato, 29 julio:

Malfermo de la Kongresejo ;
Interkonatiĝa vespero en ĝardeno aŭ
en festsalono de Kursaal.

Dimanĉo, 30 julio:

Surmonta diservo sur Gurten aŭ di-
servoj en la preĝejoj ;
Solena malfermo de la Kongreso en
granda salono de Kazino ;
Diversaj ekskursoj al ĉirkaŭaĵo de
Bern ;
Vespero je dispono de la kongresanoj.

Lundo, 31 julio:

Laborkunsido de IEL ;
Fakaj kunsidoj ;
Gvidado en grupoj tra Bern aŭ rond-
veturado ;
Teatra prezentado.

Mardo, 1 aŭgusto:

Laborkunsido de IEL ;
Fakaj kunsidoj ;
Gvidado tra la urbo ;
Partoprenado ĉe la federacia fond-
festo en grupoj.

Merkredo, 2 aŭgusto:

Tuttaga ekskurso al Berna Super-
lando, al Jungfraŭjoch kaj aliaj ravaj
lokoj.

Ĵaŭdo, 3 aŭgusto:


Laborkunsido de IEL ;
Ekskursoj al lagoj aŭ pasejo ;
Internacia kostumbalo en ĉiuj salonoj
de Kursaal.

Vendredo, 4 aŭgusto:

Fakaj kunsidoj ; prelegoj ;
Diversaj ekskursoj al historiaj lokoj.

Sabato, 5 aŭgusto:

Fermo de la Kongreso en granda sa-
lono en Kazino ;
Libervolaj promenadoj en Bern, vizit-
ado de muzeoj.



Ni vokas vin !

Vi ĉiuj, karaj geamikoj, scias ke Svislando estas la lando de la paco. Multajn vundojn batitajn de la mondmilito ĝi provis sanigi. Ĉiam trovis homoj, forpelitaj de sia patrujo, azilon aŭ novan patrujon en tiu bela malgranda lando. Svislando, kiu antaŭ ne longe feste deklaris antaŭ la popoloj sian integran neŭtralecon, ne sentas sian eminentecon en la batalo de la popoloj je superrango, sed en interpacigo de la popoloj, en paca laboro. Nia lando estas gastama ĉambro, en kiu la germana, la franca, la itala kaj la romanĉa lingvoj samrajte estas parolataj. Ĉu tiu lando ne povus esti bonega fundo por nia Esperanto ?

Svislando, la plej juna membro de Internacia Esperanto-Ligo, vokas « koran bonvenon » al la Esperantistaro.

Ni estas certaj, ke la etikaj taskoj de nia patrujo harmonias kun la celoj de la Esperanto-movado, kiu same laboras por la interkomprenigo de la popoloj kaj rasoj, kaj por reciproka kompreno de tiuj, kiuj estas apartigitaj pro lingvaj bariloj. Esperanto venkos ilin.

Vi vidus en 1939 urbon, kiu en tuta mondo estas konata kiel ĉefurbo de Svislando. Vi eltrovos ankaŭ urbon, kiu estas unu de la plej belaj en la mondo, kiu sukcesis gardi sian gloran, historian unikecon ĝis la hodiaŭa tago, urbon kiu parolas pri la progresema, diligenta sento de siaj ĉiujanoj, pri ilia sento por beleco, kaj pri ilia bonstato. Sed vi ankaŭ trovos popolon, kiu kore ĝojos bonvenigi vin ĉiujn, kiu akceptos vin kiel siajn karajn gastojn.

Loka Kongresa Komitato, Bern.

1-a kaj 2-a Bultenoj kuntiritaj

Organiza komitato: Honora prezidanto: S-ro J. Schmid, prezidinto de la 9-a Universala Kongreso 1913;

Prezidanto: H. Buchli, direktoro de la Berna Trafikoficejo;

Vicprezidantoj: D-ro W. de Lerber, kaj F. J. Portmann, direktoro de la Komerca Lernejo, Bern;

Sekretarioj: O. Walder, prezidanto de Esperanto-Societo Bern, M. Ardüser kaj f-ino G. Merz;

Ĉefkasisto: A. Hilfiker, komercisto;

Propagando, gazetaro: D-ro A. Abert, redaktoro;

Loĝado, nutrado: M. Budliger, sekretario de la Hotelista Societo;

Ekskursoj, fervojoj: A. Pfister, fervoja oficisto;

Amuzoj: E. Kohlund, reĝisoro de la Urba Tearto, kaj pliaj anoj de Esperanto-Societo Bern.

Adreso por leteroj: 31-a Universala Kongreso de Esperanto, Bern.

Kongresejo: Kazino, urba koncertejo.

Kotizoj: Ĝis 31.12.38 svisaj fk. 20.—, ĝis 31.3.39 sv.fk. 25.—, post 31.3.39 sv. fk. 30.—.

La edzo aŭ edzino de kongresano, same gejunuloj ne pli ol 20-jaraj pagas la duonon de ĉi tiuj sumoj.

Plej oportune vi pagas al nia poŝtĉeka konto III-11611 aŭ per svisaj monbiletoj, aŭ al nia banka konto ĉe Volksbank, Bern.

Pagejo por Britujo: BEA, 142 High Holborn, London W.C.1.

Pagejo por Norvegujo: Turista Komisiono, Box 353, Stabekk.

Pagejo por Svedujo: Turisto Komisiono, Tegelbacken, Stockholm.

Pagejo por Polujo: M. Chmielinski, ul. Kra-sinskiego, Torun.

Blinduloj: Blinduloj kaj ties gvidantoj ricevas senpagan kongreskarton, sed iliaj aliĝoj estu aprobitaj de s-ro W.P. Merrick (kasisto de la Blindula Ligo), Penso, Shepperton, Middlesex, Anglujo.

Aliĝoj: Haveblaj ĉe la kongresoficejo, ĉe la landaj asocioj, kaj ĉe la turistaj komisionoj.

Donacoj: Donacoj helpas al la plena sukceso de la Kongreso, kaj la kongresa komitato antaŭdankas al donacantoj.

Blindula Kaso: Por ebligi al blinduloj la kongresviziton, la Organiza Komitato danke akceptas donacojn por tiu kaso.

Glumarkoj: Aĉetu niajn ĉarmajn glumarkojn! Prezo por 50 estas 2 internaciaj respondopunoj aŭ 60 centimoj svisaj.

Fakaj kunvenoj: Ĝis nun sin anoncis: Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt- kaj Telegraf-Oficistoj.

Aliaj organizontoj bonvolu frue anonci siajn dezirojn.

Oficiala kongresgazeto: Ĉiu kongresano ricevas la oficialan kongresgazeton « Ni vokas vin ». Antaŭvidataj estas ok numeroj; la lasta enhavos la raporton pri la Kongreso. La unua numero estas multnombro forsendata kiel varbilo, interesuloj postulu ĝin de la kongresoficejo.

Karavanoj: Ni estas informitaj pri la jenaj projektitaj karavanoj:

Britujo: BEA, 142 High Holborn, London WC1. Francujo: SFPE, 34 rue de Chabrol, Paris 10. Norvegujo: Turista Komisiono, Box 353, Stabekk.

Svedujo: Turista Komisiono, Tegelbacken, Stockholm.

Skolta Tendaro: En la Kongreso okazos ankaŭ la Skolta Tendaro 1939. Informojn petu de la fakdelegitino por skoltismo: F-ino G. Merz, Falkenweg 9, Bern.

Aliĝoj: Ĝis 11.10.1938 aliĝis 140 personoj el 19 landoj.

La ĝenerala sekretario.
Otto Walder.

Unua listo de kongresanoj

1. Intendant-Generalo L. Bastien, Paris, Fr.
2. C.C. Goldsmith, Richmansworth, Britujo.
3. J. Schmid, Bern, Svislando.
4. H. Buchli, Bern, Svislando.
5. D-ro W. de Lerber, Bern, Svislando.
6. F. J. Portmann, Bern, Svislando.
7. O. Walder, Bern, Svislando.
8. M. Ardüser, Bern, Svislando.
9. F-ino G. Merz, Bern, Svislando.
10. A. Filfiker, Bern, Svislando.
11. D-ro A. Ebert, Bern, Svislando.
12. E. Kohlund, Bern, Svislando.
13. M. Budlinger, Bern, Svislando.
14. A. Pfister, Bern, Svislando.
15. P. W. Baas, Amsterdam, Nederlando.
16. Kapitano R. Bugge-Paulsen, Oslo, Norv.
17. Prof. G. Canuto, Torino, Italujo.
18. D-ro J. Couteaux, Paris, Francujo.
19. E. Dahl, Uddevala, Svedujo.
20. R. Dubois, Paris, Francujo.
21. W. Grolleman, Culemborg, Nederlando.
22. K. Th. Hansen, Köbenhavn, Danujo.
23. F. Heikenwälder, Prostejov, Ĉeĥoslovakujo.
24. H. W. Hetzel, Philadelphia, Usono.
25. Rektoro S. Jansson, Lidingö, Svedujo.
26. D-ro P. Kempeneers, Uccle, Belgujo.
27. D-ro I. Lapenna, Zagreb, Jugoslavujo.
28. B.E. Long, London, Britujo.
29. A.C. Oliver, London, Britujo.
30. P. Petit, Rosny-sous-Bois, Francujo.
31. Prof. C. Scholze, Reichenberg, Ĉeĥoslovakujo (nun Germanujo).
32. Seitaro Ŝindo, Osaka, Japanujo.
33. M. Rollet de l'Isle, Paris, Francujo.
34. P. Blaise, Morden, Britujo.
35. Prof. O. Bujvid, Krakow, Polujo.
36. D. Dalmay, Barcelona, Hispanujo.
37. C. Domingues, Rio de Janeiro, Brazilo.
38. E. Malmgren, Stockholm, Svedujo.
39. Prof. St. Minkov, Sofia, Bulgarujo.
40. T. Jung, Scheveningen, Nederlando.
- 41-50. Rezervitaj.
51. S-ino M. De Rycke, Gand, Belgujo.
52. D-ro R. G. Mäder, St. Gallen, Svislando.
53. S-ino Th. Mäder, St. Gallen, Svislando.
54. F-ino S. Holenstein, Azmoos, Svislando.
55. S-ino C.I. Goldsmith, Richmansworth, Brit.
56. J. Goldsmith, Richmansworth, Britujo.
57. J. Perlet, Bern, Svislando.
58. E. Hofer, Bern, Svislando.
59. M. Schäfli, Bern, Svislando.
60. L. Weber, Bern, Svislando.
61. R.Ch. Zollinger, La Chaux-de-Fonds, Sv.
62. F-ino A. Früh, St. Gallen, Svislando.
63. F. Walther, Nieder-Gerlafingen, Svislando.
64. F-ino M. Jay, London, Britujo.
65. J.R. Grocott, Blackburn, Britujo.
66. S-ino N. Grocott, Blackburn, Britujo.
67. C. Naoumoff, Paris, Francujo.
68. J. Vilkki, Somero, Finnlando.
69. S-ino S. Vilkki, Somero, Finnlando.
70. P. Vilkki, Somero, Finnlando.
71. G.D. Buchanan, Glasgow, Skotlando.
72. W.H. Hirst, Huddersfield, Britujo.
73. S-ino M.A. Hirst, Huddersfield, Britujo.
74. W.J. Drake, London N. 10, Britujo.
75. S-ino L. C. Drake, London N. 10, Britujo.
76. S-ino E. Groat, London, Britujo.
77. D. Kennedy, Glasgow, Skotlando.
78. F-ino A.A. Nicol, Glasgow, Skotlando.
79. F-ino A.B. Nicol, Glasgow, Skotlando.
80. P.H. Mooij, 's Gravenhage, Nederlando.
81. F-ino A.L. Borel, London, Britujo.
82. L. Jenkins, London, Britujo.
83. S-ino D.M. Jenkins, London, Britujo.
84. T.H. Ridpeth, London, Britujo.
85. S-ino A.Ch. Ridpeth, London, Britujo.
86. H. Reed, Letchworth, Britujo.
87. S-ino V. Reed, Letchworth, Britujo.
88. F-ino S. V. Reed, Letchworth, Britujo.
89. H.M.E. Herlemont, Paris, Francujo.
90. J. Stenström, Ulricehamn, Svedujo.
91. F-ino Kl. Waldén, Ystad, Svedujo.
92. P.Ch. Le Brun, Kreuzlingen, Svislando.
93. H. Benson, Blackburn, Britujo.
94. R.G. Dupuis, Haarlem, Nederlando.
95. J. Newby, London, Britujo.
96. F-ino B.M. Savage, Hastings, Britujo.
97. H.W. Homesl, London, Britujo.
98. S-ino N.A. Holmes, London, Britujo.
99. G. Bevan, Wrexham, Britujo.
100. R. Robertson, London, Britujo.
101. F-ino I. M. Cochrane, Dunfermline, Skotl.
102. F-ino M. Jones, Seven Sisters, Neath., Br.
103. S-ino L. Reigneau, Paris, Francujo.
104. Ravenstein, 's Gravenhagen, Nederlando.
105. S-ino J.M. Ravestein, 's Gravenhage, Ned.
106. F-ino M. Kennedy, Glasgow, Skotlando.
107. J.W. Pickard, Manchester, Britujo.
108. S-ino H.V. Cooper, Boomley, Kent, Brit.
109. S-ino H. Warren, East Ham, Britujo.
110. F-ino B. Ashby, Birmingham, Britujo.
111. W. H. Errington, London, Britujo.
112. G.H. Parker, London, Britujo.
113. S-ino E. A. Parker, London, Britujo.
114. A.E. Smith, Kettering, Britujo.
115. F-ino E. Squire, West Hartlepool, Britujo.
116. F-ino C.F. Taylor, Paris, Francujo.
117. E. Schmitt, Nancy, Francujo.
118. S-ino M. Schmitt, Nancy, Francujo.
119. J. Martinet, Trouan-le-Petit, Francujo.
120. F-ino H. Karlsson, Klippan, Svedujo.
121. F-ino J. Hagerman, Klippan, Svedujo.
122. B. Gahler, Gablonz a. N., Ĉeĥoslovakujo.
123. F-ino J. Downie, Glasgow, Skotlando.
124. A. Shaw, Westcliff on Sea, Britujo.
125. S-ino J. Shaw, Westcliff on Sea, Britujo.
126. Th. Pattinson, Gateshead, Britujo.
127. S-ino D. Haig, Gateshead, Britujo.
128. F-ino A. Konopová, Praha, Ĉeĥoslov.
129. A.G. Tucker, Canterbury, Britujo.
130. G. Shepherd, Newcastle-on-Tyne, Britujo.
131. S-ino H. E. Jackson, Willaston, Britujo.
132. J. F. Jackson, Willaston, Britujo.
133. S-ino W.M. Rischam, Newcastle-on-T.
134. F-ino J. Baird, Edinburgh, Skotlando.
135. St. Peksa, Nowy Targ, Polujo.
136. O.B. Sletterød, Ullevål, Norvegujo.
137. S-ino A. Sletterød, Ullevål, Norvegujo.
138. R.W.F. Kyftenbelt, Nice, Francujo.
139. F-ino L.M.A.W. van Ameyden, Nice, Fr.
140. F-ino H.M. Monod, Morges, Svislando.
141. H. Hattemer, Solothurn, Svislando.
142. S-ino L. Riedle, Zürich, Svislando.
143. E. Lentz, Aberdeen, Skotlando.
144. F-ino J. E. Thompson, Aberdeen, Skotl.
145. F-ino A.L. Richardson, Monkseaton, Br.
146. A. Jensen, Stabekk, Norvegujo.
147. F-ino L. Sandberg, Bekkelaget, Norvegujo.
148. D-ro M. Jaccard, Zürich, Svislando.
149. S-ino Y. Jaccard, Zürich, Svislando.
150. A. Baur, Zürich, Svislando.

Laŭlanda statistiko:

Belgujo 2, Brazilo 1, Britujo 49, Bulgarujo 1, Ĉeĥoslovakujo 4, Danujo 1, Finnlando 3, Francujo 14, Hispanujo 1, Japanujo 1, Italujo 1, Jugoslavujo 1, Nederlando 7, Norvegujo 5, Polujo 1, Skotlando 10, Svedujo 7, Svislando 29, Usono 1.

Entute 140 el 19 landoj.

„Viziti Svislandon”, via revo de post juneco,
efektiviĝu nun! Kaptu la okazon, venu al la 31-a!

Post la Konferenco de München

La unua demando de l' esperantistoj, kaj unu el la demandoj ankaŭ de la ĝenerala publiko, post la Konferenco de München estis, kiujn lingvojn parolis la estroj de la kvar plej gravaj potencoj de Eŭropo, kaj kiamaniere ili interkompreniĝis.

Pri tio donas respondon artikoleto en « Haagsche Courant » de 30-a de septembro (kaj sendube la tutmonda gazetararo raportis la samon), kiu sub la titolo « Lingvaj malfacilaĵoj ĉe la konferenca tablo en München » publikigis la jenon:

« La kvar registaraj ĉefoj kunvenintaj en München faris siajn preparojn, sidante ĉe tablo, kaj neniu el ili igis sin prezidanto de la kunveno. Chamberlain parolis angle, Daladier france, Hitler germane, kaj Mussolini laŭ elekto unu el ĉi tiuj tri lingvoj. La germana interpretisto, D-ro Schmidt, devis streĉe labori por ĉiufoje kiel eble plej rapide traduki la diritan. »

Mussolini do, inter la kvar ŝtatestroj, montriĝis la plej lingvosperta: li povis, laŭ elekto, paroli unu el la tri lingvoj de siaj kolegoj, dum ke ĉi tiuj kapablis paroli nur sian nacian lingvon respektivan. Ĉu ni ne rajtas supozi ke, kvankam neniu el la kvar ŝtateĉefoj sin igis prezidanto de la kunveno, Mussolini estis tiu kiu plej rapide el ĉiuj regis la situacion, kaj ke li do ankaŭ pleje povis influ la disvolviĝon kaj la rezulton de tiuj ĉi konversacioj ?

Oni demandas sin, ĉu dum tiaj malfacilaj traktadoj la koncernaj ŝtatestroj ne mem kelkfoje sentas la nesufiĉecon de la lingva situacio, kiu delonge ne estas inda je nia moderna epoko. Kaj ĉu al neniu el ili venas la ideo, ke oni almenaŭ devus foje serioze ekzameni la proponojn de l' esperantistoj, de tiu popolo, posedanta reprezentantojn en ĉiuj landoj, kiu pretendas posedi la ŝlosilon al la facila interkompreniĝo lingva ?

La ĵus pasinta krizo kun siaj militpreparoj, mobilizoj ktp. kostis al la mondo, laŭ kalkulado de « United Press », la « sumeton » de rondcifere cent milionoj da anglaj funtoj, tio estas 500 milionoj da dolaroj, aŭ preskaŭ 900 milionoj da guldenoj. Unu dekono de tiu ĉi sumo plene sufiĉus, por forigi en la daŭro de du-tri jaroj la malbenon de Babelo el la mondo, por doni al ĉiu mez-inteligenta homo la eblecon, interkompreniĝi praktike kaj facile kun ĉiu alia mez-inteligenta homo sur la tuta terglobo, — kompreneble ankaŭ la pli inteligentaj uzu la internacian lingvon,

krom la ceteraj lingvoj kiujn ili eventuale scipovas. Kaj tia ebleco de ĝenerala lingva interkompreniĝo tra la tuta mondo certe antaŭforigus ankaŭ multajn interfrotiĝojn, internacie kaj eĉ enlande.

Kial ekzistas abunda mono por tiaj aferoj kiaj estas militpreparado kaj mobilizoj, do por celoj pli malpli negativaj, eĉ detruaj, dum ke eĉ parto de tiu mono por vere konstrua celo ne estas disponebla ?

Eĉ pli kuraĝa demando : Kio okazos kun la kvin, dek aŭ dudek miliardoj da funtoj, kiujn la diversaj nacioj kune ŝparas per tio ke ili nun ne faros militon ? Ĉu oni plialtigos la vivnivelon de l' malriĉularo ? Ĉu oni donos pli altan salajron al laboristoj ? Ĉu al tiuj, kiuj sen sia kulpo ankoraŭ devas ripozi senokupe, oni donos subvencion sufiĉan por ke kun siaj familioj ili povu homece vivi ? Ĉu oni konstruos higienajn loĝejojn anstataŭ ankoraŭ ekzistantaj barakoj, ĉu oni plibonigos la lernejojn, la malsanulejojn ? Ĉu oni kuraĝigos inventistojn, ĉu oni subvencios sciencajn ekspediciojn, ne tre modeste kiel ĝis nun, sed grandskale, per tio garantiantes veran sukceson ? Ĉu oni vaste subtenos gravajn movadojn kiuj akcelas tutmondan progreson kaj kulturon, ekzemple la esperantistan ? Kio do okazos kun la miliardoj ŝparitaj ?

Ni pensas ke tiu ĉi demando ne estas sensenca. Ĉar la monon, kiun oni tute certe ĵetus alikaze en la faŭkon de la militmoloĥo, oni ja rajtus uzi nun por taskoj pozitivaj, konstruaj !

Ni ne diras ke armeoj en la cirkonstancoj de nia epoko estas superflujaj; kaj ni ankaŭ ne opinias ke ĉiuj militoj

estas eviteblaj, — bedaŭrinde ankoraŭ ne ekzistas inter la nacioj tia alta moralo kaj tia senriproĉe amika konduto, kiuj farus militojn nepenseblaj. Sed oni jam povus, post kelkaj jaroj de plej intensa armado, nun komenci vojiri en inversa direkto, — kaj per la neokazigo de l' nun atendita milito oni sendube ŝparis la miliardojn kiuj do nun devus esti disponeblaj por pacaj celoj konstruaj. *Verdire, la popoloj eŭropaj nun devus naĝi en mono.* Kaj ili povus ja naĝi en mono, *ne laŭvorte sed laŭsence*, se la mondo estus bone ordigita. *La tekniko kapabligus nin al tio.* Ne devus esti necese, paroli pri nacioj riĉaj kaj malriĉaj, aŭ pri riĉaj kaj malriĉaj individuoj. Se ĉiuj riĉaĵoj — tiuj ekzistantaj kaj eĉ pli tiuj kiujn nia progresanta tekniko estas kapabla ankoraŭ produkti — estus ĝuste disdonitaj (ni eĉ ne diras: juste!), oni bezonus paroli maksimume pri nacioj riĉegaj kaj malpli riĉaj, aŭ pri tre riĉaj kaj malpli riĉaj individuoj; sed ankaŭ la malplej riĉaj nacioj, kaj la malplej riĉaj individuoj, povus esti ankoraŭ tiel bonstataj, ke ne mankus al ili io por vivi honeste kaj feliĉe, kaj en paco kun ĉiuj ceteraj nacioj kaj individuoj.

Nu, tiun alcelindan staton ni certe ne atingos en la daŭro de kelkaj malmultaj jaroj. Sed se la München'a Konferenco, krom la reguligon de la mez-eŭropa problemo, sekvigis nur tion ke revenus iom pli paca atmosfero en Eŭropo, ke la freneza tempmezuro de la armadoj estus iom moderigata, ke al homoj suferantaj en senlaboreco, en malliberejoj, en koncentrejoj kaj en ekzilo rebrilus la suno de modesta ekzistado en laboro kaj libero, ke ankaŭ la ordinara civitano povus ree ĝoĝi kaj ĝui la fruktojn de sia laboro, — se nur tion sekvigis la « Konferenco de la Kvaro » en München, krom sia celo nete politika, oni jam estus ege kontenta, kaj dankema, kaj kun nova espero kaj fido oni rigardus en la estontecon de la gento homa.

T. J.

En München

la 4 plej eminentaj viroj de Eŭropo ne kapablis rekte interkompreniĝi pri la plej urgaj problemoj politikaj

Chamberlain parolis angle
Daladier parolis france
Hitler parolis germane
Mussolini parolis jen angle,
jen france, jen germane.

En London

1600 simplaj ĝecivitanoj el 30 landoj bonege interkompreniĝis seninterprete pri aferoj ĉiuspecaj

Ĉiuj 1600 el 30 landoj
parolis nur
la internacian helplingvon

ESPERANTO

Internacia Esperanto - Ligo

Centra Oficejo: Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo.

Oficiala Informilo

N-ro 90. 29an de septembro 1938.

NOVAJ DELEGITOJ.

Aŭstralio.

Avoca Beach. — D: F.A.W. Thomas, «Ooloo», Avoca Beach, via Gosford, N.S.W.

Hungarujo.

Sopron. — D: Alfred Nussbaum, Patak ucca 19

Jugoslavujo.

Zagreb. — FD (jurnalismo): Aleksander Turkovic, Ivkančeva 8-11.

Nederlandindio.

Surabaja (Java). — D: J.F.L. Lumaye Schuld, Niasstraat 120.

Nov-Zelando.

Christchurch. — D: C.R.S. Barrett, 24, Tui St., Fendalton, Christchurch, N.W. 1.

Svedujo.

Skövde. — FD (presado): S. E. Bohlin, Box 16.
Solleftea. — D: F-ino A. Myhrman, Box 78.

Svisujo.

Aarau (Aargau). — D: Hans Lüthy, Bleien, Gränichen b/Aarau.

Biel (Bern). — D: Em. Born, Rue des Fleurs 21. FD (PTT): La D.

Thun (Bern). — D: Hans Zaugg, Beatusstrasse 22, Dürrenast.

Usono

Atlanta (Georgia). — D: D-ro S. C. Little, 728, Myrtle St. N. E.

Columbia (South Carolina). — FD (radio): Woodruff Byrne, Radio Station WIS.

Stevens Point (Wisconsin): D: A. Bartosz, 200 North Second Street.

★

SANĜOJ.

Aŭstralio.

Blackheath. — La Delegito translokiĝis al Avoca Beach.

Britujo.

Rochester. — La D. kaj FD. translokiĝis al Svedujo.

Ĉeĥoslovakujo.

Karlsbad. — VD: nova adreso, Morgenzeile 936, «Tristan».

Jugoslavujo.

Beograd. — VD kaj FD Arbarkulturo: nova adreso, Mlade Bosne ul 7, Beograd VII.

★

PATRONO.

Bonvolis aliĝi kiel Patrono:
11. F-ino H.M. Wolff, Bussum, Nederlando.

★

JARLIBRA SUPLEMENTO.

La suplemento estas prespreta sed ni ne sendis ĝin al la presejo pro la internacia situacio. Ni tion faros kiam la situacio heliĝos.

C. C. GOLDSMITH,
Ĝenerala Sekretario.

★

Oficiala Informilo

N-ro 91. 6-an de Oktobro, 1938.

NOVA ĈEFDELEGITO.

Nederlando.

S-ro A. Pascha, Russenweg 4, Bergen, N.H., Nederlando.

Al la eksiginta Ĉefdelegito, S-ro P. H. Mooij, ni esprimas sinceran dankon pro lia celkonscia kaj bona laboro dum la lastaj jaroj, kaj ni esperas ke la forigu de tiu laboro helpas al lia rapida resaniĝo.

★

NOVAJ DELEGITOJ.

Latvujo.

Jelgava. — D: A. Neselbergs, Pasta iela 52-11.

Nov-Zelando

Auckland. — VD: H.W. Thomas, P.O. Box 1473

Polujo

Kowel: D: Jakub Pinczuk, ul. Smiglego-Rydza 49/1.

★

SANĜOJ.

Nederlando

Rotterdam. — D: nova adreso: Hebronstr. 3 A.

Nov-Zelando

Petone. — La D. translokiĝis al Auckland.

IEL : Kotizoj 1939

MEMBRO KUN JARLIBRO (MJ) ricevas membrokarton, servokuponaron kaj la Jarlibron.
MEMBRO-ABONANTO (MA) ricevas membrokarton, servokuponaron, la Jarlibron kaj la monatan oficialan gazeton « Esperanto Internacia » dum la jaro.

MEMBRO-ABONANTO-HEROLDO (MAH) ricevas membrokarton, servokuponaron, la Jarlibron kaj la semajnan gazeton « Heroldo de Esperanto » dum la jaro.

MEMBRO-SUBTENANTO (MS) ricevas membrokarton, servokuponaron, la Jarlibron kaj la monatan oficialan gazeton « Esperanto Internacia ». Li afable pagis pli altan kotizon por helpi I.E.L. finance.

PATRONO ricevas membrokarton, servokuponaron, la Jarlibron kaj la monatan gazeton « Esperanto Internacia ». Li bonvole pagas la dekoblan MA-kotizon por heli al pli efika propagando internacia.

ENTREPRENO (Ent.) estas la nomo donita al firmo, hotelo, ktp., kiu subtenas la Esperantistan organizaĵon per pago de kotizo kaj rekompence rajtas enpresigi anonceton maksimume 40-vortan en la Jarlibron.

EN LANDO, kies Landa Asocio aliĝis al I.E.L., estas alpagota la respektiva kotizo de la Landa Organizo.

Oni povas pagi kotizojn al Loka Delegito de IEL, al la Ĉefdelegito, al Landa Asocio, se tiu aliĝis al IEL, aŭ al la Centra Oficejo, **Internacia Esperanto-Ligo**, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

LANDO (laŭ kursoj 28.9.1938)	MONO	MJ	MA	MAH	MS	Ent.	Abono E.I.	Abono Heroldo
Argentino	pesoj	3	7.5	15	20	7.5	5	12
Aŭstralio	ŝil.	4	10	18	25	10	7	15
Belgujo	fr.	20	50	128	175	50	35	108
Brazilo	milr.	12	35	80	100	35	25	68
*Britujo	ŝil.	9	15	23	30	10	7	15
Bulgarujo	levoj	80	200	500	600	200	130	420
Ĉeĥoslovakujo	kr.	20	50	125	150	50	35	108
Ĉinujo	dolaroj	3	8	25	30	8	6	22
Danujo	kr.	3.5	9	19	25	9	6	16
Estonujo	kr.	2.5	6.5	17.5	20	6.5	4.5	15
Finnlando	fmk.	40	100	210	250	100	70	170
*Francujo (Ĝ Kolonioj)	fr.	22	60	165	250	60	40	145
Grekujo	dr.	100	250	520	700	250	160	420
Hungarujo	peng.	4	10	24	30	10	6.5	20
Italujo	liroj	15	40	90	120	40	30	75
Japanujo	jenoj	2.5	6	16	20	6	4	13.5
Jugoslavujo	din.	30	90	200	250	90	65	170
Kanado	dolaroj	1	2	4.5	6	2	1.25	4
Latvujo	lat.	4	10	24	30	10	7	20
Litovujo	lid.	6	15	30	40	15	11	25
Nederlando	gld.	2	4	8.5	10	4	2.5	6.8
Norvegujo	kr.	3	8	18	24	8	5.5	15
Nov-Zelando	ŝil.	4	10	18	25	10	7	15
Polujo	zl.	4	11	24	30	11	8	20
Portugalujo	esc.	15	40	105	125	40	30	90
Rumanujo	lei.	100	250	660	800	250	175	560
Svedujo	kr.	3	8	18	24	8	5.5	15
Svisujo	fr.	4	10	19	25	10	7	16
Turkujo	pias.	100	300	600	750	300	225	500
Urugvajo	pesoj	2	5	12	15	5	3.5	10
Usono	dolaroj	1	2	4.5	6	2	1.25	4

* indikas ke la kotizo enhavas ankaŭ la kotizon de la Landa Asocio, sed ne tiujn de la grupo kaj federacio.

JARLIBRA SUPLEMENTO.

Ĝi estas nun ĉe la presejo, kaj ni esperas dissendi ĝin post proksimume 14 tagoj.

★

MONATA STATISTIKO

Membraro.

Jen la stato de la pagitaj kotizoj ĝis la fino de Septembro, kaj ankaŭ, por komparo, ĝis la fino de Septembro, 1937:

Septembro 1938 Septembro 1937

Asociaj Membroj	7335	9122
Individuaj Membroj		
MJ	1320	1126
MA	1011	989
MAH	301	248
MS	132	133
Patronoj	11	13
DM	73	74
HM	30	2878
	31	2614
	10213	11736

★

INTERNACIA KONKURSO 1938

Stato je la 30a de Septembro, 1938.

	Poentoj		
	1937	1938	%
1. Bulgarujo	92	326	254.3
2. Svislando	137	458	334.3
3. Jugoslavujo	257	679	264.2
4. Polujo	318	631	198.4
5. Latvujo	55	101	183.6
6. Finnlando	61	102	167.2
7. Litovujo	135	169	125.2
8. Aŭstralio	429	464	108.1
9. Kanado	74	79	106.7
10. Norvegujo	792	825	104.2
11. Belgujo	1722	1738	100.9
12. Nov-Zelando	265	267	100.7
13. Britujo	6483	6469	99.8
14. Usono	1513	1471	97.2
15. Sud-Ameriko	851	802	94.2
16. Portugalujo	317	293	92.4
17. Nederlando	2837	2628	92.3
18. Hungarujo	619	564	91.1
19. Francujo	5907	5309	89.8
20. Italujo	636	561	88.2
21. Svedujo	3024	2532	83.7
22. Ĉeĥoslovakujo	2449	1805	73.7
23. Afriko	137	99	72.3
24. Danujo	1118	755	67.4
25. Rumanujo	50	27	54.0
26. Azio	1321	563	42.6
27. Aŭstrujo	789	311	38.9
28. Grekujo	137	—	—
	32525	30028	92.3

Meza

Korespondantoj.

Centra Oficejo (sen la gazetoj) dum Septembro, 1938:

Ricevitaj	488
Senditaj	1095

1583

C. C. GOLDSMITH,
Ĝenerala Sekretario.

Oficiala Informilo

N-ro 92. 19an de Oktobro, 1938.

ESTRARO.

La elekto de la Estraro por la venonta tri-jara periodo, farita dum la kunsidoj de la Komitato en Londono, estas nun konfirmita de la tuta Komitato, kaj jen la rezulto:

Prezidanto: Intendanto-Generalo L. Bastien, Francujo.

Vic-Prezidanto: S-ro E. Malmgren, Svedujo.

Estraranoj: D-ro P. Kempeneers, Belgujo.

D-ro I. Lapenna, Jugoslavujo.

S-ro A. C. Oliver, Britujo.

★

NOVAJ DELEGITOJ.

Belgujo

Kaaskerke (West-Vlaanderen). — D: O. Berteloot, Diksmuidestraat 79B, Kaaskerke apud Diksmuide.

Britujo

Birmingham. — FD (Instruistaj aferoj): F-ino E. Norman, 61, Kingsley Road, Kings Norton, Birmingham.

Chichester. — FD (Skoltismo). — W. J. Murrey, 38, Washington Street.

Romiley (Cheshire). — D: W. B. Currie, «Redthorn», Lane Ends.

St. Albans. — D: F-ino L. Frankenburg, St. Hilda's, Ridgmont Road.

Francujo

Nice. — D: R. Fiquet, 2, Place Carabacel. (Tel. 818-77).

Nederlando

Den Haag. — FD (Filatelio): P. H. Mooij, Teunisbloemlaan 19.

Laren. — D: G. Luinge, Klooster 34, Laren, N. H.

Portugalujo

Lisboa. — FD (Kulturaj aferoj): J. Bigotte d'Almeida, Rua do 4 de Infantaria, 51 A.
FD (Veterinarscienco): J. M. de Abreu e Silva, Rua Viriato, 23-3-D.

★

SANGOJ.

Nederlando

Culemborg. — D: nova adreso: Burgemeester Heestrasingel 10.

★

JARLIBRA SUPLEMENTO.

Ĝi eliros post du tagoj. Se iu ne ricevis ĝin, bonvolu tuj sciigi al la Centra Oficejo.

★

KOTIZOJ 1939.

En aparta loko ni informas pri la kotizoj por la venonta jaro, kaj ni ankaŭ sendas la informon al ĉiu membro kun la jarlibra suplemento. Frua pago de la kotizo estas konsilinda por eviti interrompon en la ricevo de la gazetoj. Nunaj MA ricevos « Esperanto Internacia » n nur ĝis la februara numero, kaj nunaj MAH ricevos « Heroldo » n nur ĝis numero 4 de 1939.

Oni notu, ke Membro-Subtenanto en 1939 ne ricevos premion.

★

ADRES-SANGOJ.

Centra Dana Esperantista Ligo, Fannerup pr. Kolind, Danujo.

Jugoslavia Esperanto-Ligo, Primorska ul. 2, Zagreb, Jugoslavujo.

C. C. GOLDSMITH,
Ĝenerala Sekretario.

La Babela fatalo

Ankoraŭ pri la lingva problemo en München.

Germana gazetaro mem konfesas la lingvaj malfacilaĵojn; sed "kompreneble" Esperanto estas plu nedezirata.

En la ĉiutaga germana ĵurnalo « Die Glocke » (La Sonorilo), aperanta en Oelde (Vestfalia), 1.10.1938, ni legas la jenan raporton, kiu tutcerte aperis en multaj aliaj germanaj kaj supozeble ankaŭ alilandaj gazetoj:

La Konferenco de la Kvar en München deruligis en la daŭro de dekdu horoj, konforme al la volo kaj deziro de ĉiuj koncernatoj, ke oni povu ĉiel eble plej frue komenci kaj ĉiel eble plej frue fini. Tial oni tuj enpaŝis en la interkonsiliĝojn, post kiam la gastoj de la Guidanto alvenis en la Ĉefurbo de la Movado (t.e. en München, ĉiu estas la sidejo de la nacisocialista movado. — Red.).

La priparolado dividiĝis je tri partoj: unu okazis en la tagmezaj, alia en la vesperaj, kaj la tria en la noktaj horoj. Oni estus povinta kuntiri (t.e. mallongigi) la konversaciojn, se ne pro la diverseco de la lingvoj de l' koncernatoj estus necesa la perado de interpretistoj, ĉiu kompreneble efikis temporabe, ĉiel ankaŭ la verkado de la diversaj dokumentoj okazis kun perdo de tempo, ĉar oni devis kompari ilin, kaj interagordi iliajn formulojn laŭvorte kaj laŭsence.

★

Do, ankaŭ en la nuna Germanujo oni plene ekkonas la lingvaj malfacilaĵojn; sed oni akceptas ilin ĉiel neŝanĝeblan fatalon. Se Germanujo estus akceptinta ankaŭ la Versajlan diktaton ĉiel fatalon, neniam ĝi sukcesus nuligi tiun dokumenton.

Oni ne scias, ĉu — ĉiel esperantisto — oni ridu aŭ ploru pri tia nekredibla miopeco en lingva rilato, kiam oni legas, ekzemple, pri la perado de l'interpretistoj, ke ĝi « kompreneble » (!!!) efikis temporabe. Kompreneble, jes! Sed ni ne povas mense kapti, kial oni « kompreneble », rezignacie, kun pendantaj brakoj, devas akcepti tiun temporaban staton, dum ke la preta rimedo, por plibonigi tiun staton, jam delonge ekzistas kaj plene funkcias! Sed, « kompreneble », Esperanto restas plu « nedezirata ». Ĉis kiam?

UNUECO ESTAS FORTO!

La Varbgarantia Ĉeko

Propaganda parolado

farita de E. Malmgren dum la 30-a Univ. Kongreso en Londono.

I.

Varb-garantianto = venko-garantianto !

Esperantistoj, kion ni atendis dum la pasintaj 50 jaroj ? Ho, ni atendis miraklon. Sed, vi diras: ĉu ni ne travivis miraklon, nome ke ni povas interparoli per la mirinda ilo Esperanto? Vi pravas. Tio estas la unua miraklo, kiun ni jam travivis. Kaj ĝuste pro tio ni tuj postulis alian miraklon: nome ke ĉiuj homoj en la mondo akceptu Esperanton, tuj kiam ili ekaŭdos pri ĝi.

Sed tiu miraklo ne efektiviĝis. Kaj tamen ni konstante atendas, ke tiu miraklo efektiviĝos subite — tuj. Kaj senpacience ni turnas nin al registaroj kaj institucioj, kaj konstante ni kredas, ke la registaroj akceptos nian lingvon, se ili sciigos pri ĝi.

Kunbatalantoj, mi ne kredas, ke ni laŭ tiu vojo atingos la celon. Nur se ni estos multaj, se ni estos granda amaso, tiam la registaroj agos laŭ nia decido !

Jen do la demando: Ĉu troviĝas vojo por kolekti plimulton ?

Rigardu !

Ĝis nun ni havis la intencon tuj esperantistigi la tutan mondon. Pro tio ni malatentis la unuopajn simplajn personojn. Ni celis havigi al nia movado tuj multajn homojn kaj atenti la potenculojn. Kaj se ni ekz. havis eblecon esperantigi iun konaton, kiu estis ordinara homo, ni ofte opiniis, ke ne indas penadi esperantigi lin. Ni rezonis kun ni mem tiel : Se mi nun esperantigas lin, mia laboro ja preskaŭ nenion signifas. Li estas nur unu persono. Kaj la cifero 1 estas preskaŭ la cifero 0. Ni ne atentis, ke per multaj 0-oj oni povas atingi 100 aŭ 1000 aŭ 100.000, se troviĝas antaŭ la 0-oj nur la malgranda cifero 1 !

La nova sistemo, kiun ni nun volas inaŭguri, ŝatas la malgrandajn ciferojn. La nova varbsistemo ne diras al vi : Varbu multajn kursanojn ! Ne, ĉar ni ja provis tion dum 50 jaroj, kaj ne sukcese. Jen, la nova sistemo diras : Varbu unu novan esperantiston !

Sed vi diros eble : Mi povas varbi unu novan esperantiston sen iu ajn sistemo kaj sen iu ajn speciala promeso. — Jes, mi scias ! Sed vi ne faros. — Kial ? Ĉar vi ne scias, vi ne havas promeson, ke ankaŭ aliaj esperantistoj solidare faros same. Nur se oni scias, ke oni estas en bona akompano, kaj ke aliaj laboras laŭ la sama maniero, oni labo-

ras kaj ŝatas labori.

Pro tio ni nun pretigis specialajn kartojn por tiuj esperantistoj, kiuj deklaras sin pretaj varbi por la jaro 1938 unu novan esperantiston.

Rigardu ! Mi ne diras, ke vi promesas varbi unu novan kursanon ! Tio estas malnova sistemo ! La nova sistemo postulas pli.

Ĝis nun vi kutimiĝis varbi por Esperanto tiel, ke vi instigis iun aŭ kelkajn personojn partopreni Esperanto-kurson. Kaj vi frapis vian bruston en fiero kaj pensis : Nun mi faris mian devon, kaj la instruisto faru sian devon.

La nova sistemo diras : Vi ne finfaris vian devon, se vi nur kursigas iun homon. Bonvolu atenti, ke la instruisto devas instrui multajn, kaj li ne kapablas vere esperantigi ĉiujn kursanojn. Ĝuste post la kurso komenciĝas la esperantistiĝo. Per tiu vorto mi celas ne nur kapablon paroli balbute nian lingvon, sed emon partopreni nian movadon kaj intereson disvastigi ĝin.

Ĉu mi rakontu, kiel mi fariĝis esperantisto ?

Hazarde mi sciigis pri Esperanto, kaj mem studis kelkajn librojn. Kaj hazarde mi poste iun tagon venis al Esperanto-klubo. Poste mi ne revenis, ĉar mi ja preskaŭ ne povis balbulti Esperanton kaj ĉar mi ne havis konatojn en la klubo, kaj — ĉar mi ne havis tempon. Kaj pasis unu monato, pasis du kaj pasis tri monatoj. Tiam telefonis al mi Stokholma esperantisto kaj diris : Bonan tagon, kiel vi fartas, kion vi faras, kion vi studas,

kaj fine — ĉu vi nuntempe legis iun esperantan libron? Mi respondis, ke mi ne havis tempon, ĉar mi vizitas la universitaton. Sed li diris: Jes, sed vi devus tamen ankoraŭfoje viziti la Esperanto-klubon.

Pasis unu kaj du kaj tri monatoj. Tiam la esperantisto denove telefonis kaj faris la samajn demandojn, en ĝentila maniero. Li montris sian intereson pri mi. Sed mi ne iris al la klubo.

Pasis denove unu aŭ du monatoj, kaj la esperantisto telefonis. Ripetiĝis la afablaj demandoj kaj respondoj. Sed post tiu lasta telefona alvoko mi diris al mi mem: Jen, Malmgren, vi eble devus tamen viziti la Esperanto-klubon, ĉar povus esti interese !

Kaj mi vizitis la klubon. Post kelkaj novaj telefonaj alvokoj mi finfine estis firme katenita al la klubo kaj al Esperanto.

Mi imagas, ke tiu maniero montras al ni la vojon.

Kiam ni sukcesis havigi al iu Esperanto-kurso kelkajn kursanojn, ni devos montri specialan intereson al la kursano. Kaj speciale post la kurso. Iu esperantisto devas kelkfoje viziti lin, renkonti lin, inviti lin hejmen, montri al li Esperanto-gazeton kaj librojn, akompani lin al la Esperanto-klubo, konatigi lin al aliaj esperantistoj kaj entute lasi lin kompreni, ke li estas ŝatata persono, kaj ke ni volas, ke li sentu sin hejme en nia rondo.

La ĉefa afero do ne estas varbi al Esperanto-kurso, tion oni ja povas fari eĉ per anoncoj en gazetoj. Sed la ĉefa afero estas varti kaj flegi la novan Esperanto-planton kaj atente zorgi pri ĝia bonfarto post la kurso.

N-ro 1071

Per tio ĉi mi devigas min dum la jaro varbi unu novan Esperantiston. Mi ankaŭ devigas min prizorgi lian (ŝian) Esperantistiĝon tiamaniere, ke mi dum minimume unu jaro je konvenaj tempoj renkontos lin, donos konsilojn k.t.p., tiel ke li fine sentu sin forte ligita al Esperanto, kaj ke li iom post iom mem estos preta aktive labori por Esperanto. Mi poste provos instigi lin preni sur sin la saman devigon rilate al membrovarbado, kiun mi nun faras.

La plenumo de tiu ĉi promeso estas konsiderata de mi kiel honora devo.

Dato
Varb-garantianto
Adreso

Post subskribo sendu tiun ĉi parton de la kupono al la sekretario de la klubo aŭ rekte al

VARB-GARANTIANO

N-ro 1071

Kiel Varb-garantianto vi devigas vin dum la jaro varbi unu novan Esperantiston kaj prizorgi lian (ŝian) Esperantistiĝon dum minimume unu jaro.

Rekomendinde estas, ke vi Esperantistigu nur unu personon, ĉar pli oni kutime ne kapablas en unu jaro.

Bonvolu speciale atenti, ke ne sufiĉas nur rekomendi iun personon partopreni Esperanto-kurson. Ĝuste post la kurso komenciĝas la plej malfacila laboro, ĉar tiam oni devas ligi la novevarbitan Esperantiston al nia movado.

Ni atendas, ke vi faros vian devon.

Internacia Esperanto-Ligo

Tiun ĉi parton konservu la Varb-garantianto.

N-ro 1071

Nomo

Adreso

estas varbita de mi kiel nova Esperantisto.

Dato

Nomo

Adreso

Post varbado donu tiun ĉi parton de la kupono al la klubo sekretario aŭ sendu ĝin rekte al

Specimeno de la Varbgarantia Ĉeko (malgrandigita).

Kiam en la venontaj monatoj oni prezentos al vi tian « ĉekon » por subskribo, kaj se iel vi havos la ŝancon kapti iun homon por Esperanto, ne hezitu subskribi! Per tio vi bonege servos nian aferon.

Por montri al vi kaj al la tutmonda esperantistaro, ke ni speciale deziras vian helpon kaj la helpon de ĉiuj esperantistoj en la laboro varti kaj flegi la novulojn, ni decidis krei novan membro-kategorion. Kaj al tiu membro-kategorio kiu ajn povas aliĝi sen kotizo. Sed por fariĝi membro de tiu nova kategorio, vi devos subskribi la jenan deklaron :

« Mi devigas min dum la jaro 1938 varbi unu novan esperantiston. Mi ankaŭ devigas min prizorgi lian (ŝian) esperantistiĝon tiamaniere, ke mi dum minimume unu jaro je konvenaj tempoj renkontos lin, donos konsilojn ktp., tiel ke li fine sentu sin forte ligita al Esperanto, kaj ke li iom post iom mem estos preta aktive labori por Esperanto. Mi poste provos instigi lin preni sur sin la saman devigon rilate al membrovarbado, kiun mi nun faras. »

Kiam vi subskribis tiun deklaron, vi fariĝos « Varbgarantianto », tio signifas « Venĝo-garantianto ».

Vi povos plenumi vian devon tiamaniere, ke vi unue varbos unu personon al Esperanto-kurso kaj poste gvidos lin ĝis esperantistiĝo. Vi povas ANKAŬ elekti iun personon, kiu partoprenas komencan Esperanto-kurson por speciale rilati kun li, helpi lin kaj gvidi lin dum unu jaro.

Kaj rigardu : La devigo diras, ke vi bezonas esperantigi nur unu personon dum unu jaro. Se vi ekz. hodiaŭ fariĝas « Varb-garantianto », vi havos je via dispono la tempon 1 aŭgusto 1938 ĝis la 1 aŭgusto 1939.

Ĉu estas tro ampleksa postulo, ke vi varbu kaj esperantigu unu personon dum tuta jaro ? Ne !

Eble vi nun diros : Tiu nova sistemo estas tre simpla, ĝi estas tro simpla. Kaj se ni varbas nur unu novan esperantiston, ni ne alportos al nia movado sufiĉe da nova sango. Ĉar ĉiu Varbgarantianto esperantigas ja nur unu novan.

Sed mi ja diris en la komenco, ke ni ŝatas la malgrandajn ciferojn ! La cifero 1 estas sufiĉa ! Mi montros al vi :

Aŭskultu, aŭskultu ! En multaj landoj en tiu momento estas tiom da esperantistoj, ke mi rajtas kredi kaj esperi, ke almenaŭ 1.000 esperantistoj deklaras sin pretaj varbi po unu novan esperantiston. Tiam, samideanoj, post unu jaro ni estos 2.000 veraj esperantistoj !

Venos la dua jaro: La 2.000 esperantistoj, la Elit-esperantistoj por la jaro 1939, ankaŭ varbos po unu novan esperantiston. Rigardu: nur unu novan ! Kaj je la fino de la dua jaro ni jam estos 4.000.

Dum la 3-a jaro la 4.000 Elit-esperantistoj denove varbos kiel en la antaŭaj jaroj. Ĉiuj varbos nur 1 novan esperantiston. Ĉu estas tro granda postulo, ke ĉiu esperantisto varbu unu esperantiston ? Ne. Do, je la fino de la 3-a jaro ni kalkulos 8.000 esperantistojn.

Kiam la 4-a jaro komenciĝos, 8.000 esperantistoj estos pretaj varbi po nur unu esperantiston, kaj tiel ni estos 16.000.

Kaj en la komenco de la jaro 1942 ni kalkulos 16.000 esperantistojn, kiuj estos pretaj fari sian devon kiel Elit-esperantistoj. Ĉiu esperantisto konstante nur unu novan esperantiston ! Je la fino de la 5-a jaro ni do estos 32.000 esperantistoj.

En la sesa jaro la 32.000 Elit-esperantistoj laboros same trankvile, same malrapide, elektante nur unu novan personon por sia esperantistiga laboro. Jam estos 64.000 esperantistoj.

Kaj la sepa jaro vidos la 64.000 Elit-esperantistojn varbi kiel antaŭe po unu novan esperantiston, kaj tamen la esperantistaro atingos la ciferon de 128.000.

Se la Elit-esperantistoj laboros laŭ la sama principo dum la 7-a jaro, ni atingos la ciferon 256.000 esperantistoj.

Post la 8-a jaro ni estos 512.000 esperantistoj.

Kaj en la komenco de la jaro 1948 ni estos 1.024.000 kapablaj esperantistoj. Tamen ĉiu el ni varbis kaj esperantigis nur 1 personon pojare. Neniu el ni faris superhoman laboron. Sed per nia persista, sistema kaj libervola laboro ni tamen atingis mirindajn rezultojn. Kiu ne volas partopreni en tiu laboro ? Ho, ĉiuj volas kunhelpi ! Ĉar ni vidas la eblecon finvenki. Kaj ĉar ni scias, ke en ĉiuj landoj de la granda Esperantujo diligente laboras « Varb-garantiantoj »,

Kiam mi en la venonta jaro renkontos vin en la Kongreso de Bern, mi demandos vin, ĉu vi faris vian devon kiel « Varb-garantianto ». Kaj mi atendas, ke ĉiu el vi kun venka brilo en la okuloj respondos : « Jes, mi faris mian devon ! »

Do, antaŭen ek kun arda fervoro ĝis la fina venko : « Esperanto, ĉies dua lingvo ! ».

(Daŭrigota.)

La 1000-a Numero

de HEROLDO DE ESPERANTO, la oficiala semajna organo de IEL, aperos je la 20-a de Novembro nunjara.

HEROLDO DE ESPERANTO

sukcesis, en la daŭro de sia preskaŭ 20-jara ekzistado, per sia regula aperado ĉiusemajna kaj per sia fidinda raportado pri ĉiuj branĉoj de nia movado, akiri al si la konfidon de l' Esperantistaro tutmonda. Se vi ne jam abonas ĝin, fariĝu abonanto por la jaro 1939 ! Novaj abonantoj ricevos

senpage ĉiujn numerojn

ankoraŭ aperontajn dum la nuna jaro, de post la momento de sia aboniĝo. Tuj anoncu vin kiel abonanto de la oficiala semajna organo : rekte ĉe la Administracio de HEROLDO DE ESPERANTO, Harstenhoekweg 223, SCHEVENINGEN, Nederlando, aŭ eĉ pli bone kiel MAH por 1939 ĉe via Ĉefdelegito, aŭ rekte ĉe la Centra Oficejo de IEL, Heronsgate, RICKMANSWORTH (Herts.), Anglujo. Se vi deziras antaŭe ekkoni la semajnan gazeton, sendu al nia Administracio en Scheveningen unu respond-kuponon, kaj tiam ni liveros al vi tri diversajn specimenajn numerojn (sed ni ne liveras specimenajn numerojn senpage).

Esperantistoj, subtenu vian solan semajnan gazeton !

17 monatoj post la Konferenco "Esperanto en la Moderna Vivo":

Oficiala cirkulero enkondukas Esperanton

en la liceojn, gimnaziojn, kolegiojn kaj teknikajn lernejojn de Francujo

17 monatoj nur pasis de post la fino de la Internacia Konferenco « Esperanto en la Moderna Vivo ». La Plenumkomitato de la Konferenco realigis jam pli ol du trionojn — almenaŭ por Francujo — de la deziresprimoj de la Konferenco*).

En la radio, en la doganoj, en la poŝtoj, en la armeo, en la aerveturado, en la ŝiparmeo, oficialaj cirkuleroj enkondukis praktike Esperanton.

Hodiaŭ, kaj dank' al ĉefe la klopodoj de s-ro *Couteaux*, ĝenerala sekretario de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto kaj komitatano de IEL, la franca Ministro pri Publika Duagrada

Instruado, s-ro *Jean Zay*, pere de la Direktoro de la Duagrada Instruado, s-ro *Chatelet*, kaj de la Ĝenerala Direktoro de la Teknika Instruado, s-ro *Luc*, diris per entuziasmaj vortoj, kiel multe la lernado de Esperanto estas "dezirata" en la franca universitato.

De nun, en ĉiuj liceoj, kolegioj, gimnazioj, lernejoj por geinstruistoj, teknikaj lernejoj, oni rajtas instrui libervole Esperanton kaj enigi ĝin en la tiel nomitajn « kontrolatajn distriĝojn » (*activités dirigées — loisirs dirigés*).

Jen la cirkulero en sia originala franca teksto kaj en la Esperanta traduko:

PARIS, le 11 OCTOBRE 1938.

Le Ministre de l'Éducation Nationale
à Messieurs les Recteurs.

Mon attention a été appelée, à diverses reprises, sur l'intérêt que présente, dès maintenant, et que présente davantage encore dans l'avenir, la connaissance de l'Espéranto, langue auxiliaire susceptible de faciliter les relations aussi bien entre les intellectuels qu'entre les commerçants et les techniciens des diverses nations.

J'ai l'honneur de vous faire connaître qu'il me paraît souhaitable de faciliter le développement des études espérantistes. Certes il ne peut être question de donner à l'enseignement de l'espéranto une place dans les horaires des études obligatoires de nos établissements d'enseignement du second degré et dans nos écoles techniques. Mais si des cours facultatifs d'espéranto peuvent être institués, je n'y verrai que des avantages. On peut l'admettre aux Loisirs dirigés.

Je vous serais obligé de porter ces instructions à la connaissance des chefs d'établissement scolaire de votre Académie.

Par autorisation.

Le Directeur de
l'Enseignement Technique:
Signé: H. LUC.

Le Directeur du
Second Degré:
Signé: CHATENET.

Ni ne petas ke oni sendu dankleterojn al la subskribintoj; sed, en la intereso mem de nia movado, ni petas:

1-e, ke ĉiu esperantisto larĝe konigu tiun gravan sukceson kiel eble plej amplekse: per gazetoj, per paroladoj, ktp.;

2-e, ke la landaj asocioj, interkonsente kun IEL kaj TAGE, rapide zorgu, por ke la aliaj registaroj alprenu samajn decidojn kiuj, se ili estos multnombraj kaj rapidaj, povos sufiĉe baldaŭ alporti al nia movado definitivajn sukcesojn.

Ne plu estas momento, nek loko, por

PARIS, la 11-an de OKTOBRO 1938.

La Ministro de Nacia Edukado
al la Akademijaj Rektoroj.

Oni atentigis min plurfoje pri la intereso, kiun prezentas de nun, kaj prezentos ankoraŭ pli estonte, la scipovo de Esperanto, helpa lingvo, faciliganta la rilatojn tiel inter intelektuloj, kiel inter komercistoj aŭ teknikuloj diversnaciaj.

Mi havas la honoron sciigi vin, ke ŝajnas al mi dezirinde faciligi la disvastigon de esperantaj studoj. Certes, ne temas pri instruado de Esperanto entenata en la horaro de devigaj studoj en niaj duagradaj kaj teknikaj lernejoj. Sed, se liber-volaj Esperanto-kursoj povos okazi, mi vidos en tio nur profiton. Oni povas ĝin akcepti dum « kontrolitaj distraĵoj ».

Mi estos al vi dankema konatigi tiujn informojn al la lernejestroj de via Akademio.

La Direktoro de
Teknika Instruado:
H. LUC.

La Direktoro de
Duagrada Instruado:
CHATENET.

diskuti pri organizaj demandoj aŭ similaj bagatelajoj, ni sekvu ĉiuj kune la vojon de la sukceso, kiun montris al ni la Pariza Konferenco.

P. Petit,

Konstanta Sekretario de SFPE,
Komitatano de IEL.

* Oni profite legos pri tio la « Raportojn kaj Konkludojn de la Konferenco ». Tiu ĉi libro kun riĉa enhavo estas sendata kontraŭ 12 francaj frankoj pagotaj al: SFPE, 34 Rue de Chabrol, Paris. (Poŝtĉekkonto Paris 855.35.)

20-a Nacia Kongreso de Italaj Esperantistoj en Vicenza

En la arta malnova urbo Vicenza, je la 3-a kaj 4-a de septembro, okazis la 20-a Nacia Kongreso de la italaj esperantistoj. La Kongreson ĉestis la urbestro de Vicenza, la vicrektoro de la loka Akademio « Olimpica », la direktoro de la tiea ŝtata provinca Organizo por Turismo. Temo de la ĉefaj diskutoj dum la kongreskunsidoj estis: « Esperanto kiel ilo por turisma propagando ».

En la unua tago okazis ĉe la Faŝista Domo ceremonio, per kiu la kongresanoj honoris la mortintojn de la movado en la al ili dediĉita kapelo. Post ĉi tiu ceremonio okazis en la teatro « Olimpionico » (unu el la ĉefverkoj de l' mondfama renesanca arkitekto Palladio) la malfermo de la Kongreso kun la bonvenparolado de la urbestro, al kiu respondis la prezidanto de Itala Esperantista Federacio, Prof. D-ro Giorgio Canuto. Fermis la matenon la unua laborkunsido en la ĉefa salono de la Akademio « Olimpica », en kiu Prof. Canuto parolis pri « Esperanto kaj Turismo » tre efike, elmontrante, kiel nur per la helpa lingvo Esperanto vojaĝantoj povas profunde konatiĝi kun la interna animo de ĉiu ajn lando, kontaktiĝante kun la tiea esperantistaro.

Dum la kunsido mem oni vizitis la belan Ekspozicion de la Esperanto-movado en apuda salono, riĉa je propagandiloj, gazetaro kaj verkaro ĉiuspeca.

Je la fino de la unua kunsido okazis tre vigla pridiskuto por reorganizo de poresperanta propagando en Italujo, kiun partoprenis precipe Prof. Canuto, Rag. Pace, Profesoroj Facchi kaj Saggiori, Generalo De Winckels, D-ro Koch, kaj aliaj.

La sekretario de Itala Esp. Federacio legis multajn salutojn ĵus alvenintajn el diversaj landoj, el kiuj ni mencias tiujn de IEL, de Sveda Esp. Federacio, de Heroldo, de Literatura Mondo.

En la dua tago de la Kongreso okazis religia katolika diservo farata de la konata malnova esperantista pastro Modesto Carolfi, kiu dum la diservo mem esperantlingve predikis pri unu el la evangelioj.

En la sama tago, la dua kunsido estis speciale dediĉita al la reorganizo de la Itala Esp. Federacio, al ties propagand-organo « L'Espéranto », kaj al la reorganizo de la instruado. En la posttagmezo okazis aŭtobusa ekskurso de la kongresanoj al Monto Pasubio kaj al ties monumento, dediĉita al la mortintoj en tieaj bataloj dum la itala-aŭstra milito de 1915-1918.

La tuta Kongreso montris la gravecon de la nuntempa itala Esperanto-movado, kiu en la lastaj jaroj akiris rimarkindajn sukcesojn en radio kaj turismo ĉe la koncernaj organizoj de la itala ŝtato.

G. Facchi, Brescia.

48 hungaraj poŝtkartoj kun Esperantoteksto

Oni sciigas, ke la hungara poŝto jam triafoje eldonis (tute silente ankoraŭ en 1937) bildpoŝtkartojn kun Esperantoteksto apud hungara kaj franca. Oni rememoras eble, ke la unua serio (16 po 16 = fileraj kartoj) aperis en 1933 kaj dua serio (16 po 10 = fileraj) en 1935. Ĝis nun entute aperis 48 poŝtkartoj diversbildaj kun Esperanto-teksto. El ili 47 estas konstante haveblaj. 16 estas 16 = fileraj, 31 estas 10 = fileraj.

FRUTEMPE REPAGU vian IEL-kotizon por 1939 !



Esperanto-Filmo

Esperanto progresas, malgraŭ malfavoraj cirkonstancoj nuntempaj. Plej bone tion ilustras la fotografiaĵoj, kiuj de tempo al tempo atingas nian redakcion. Hodiaŭ ni denove kombinis elekton de kvino el ili por « Esperanto-filmo ».

La supra bildo montras ses gesamideanojn el tri nacioj, okaze de vizito de brazilaj esperantistoj al italaj samideanoj-maristoj de la ŝipego « Conte Grande », en Recife (Pernambuko), Brazilo. De maldekstre: s-ro Odilon, redaktoro de grava « Jornal do Comercio »; nia fama propagandisto inter maristoj pastro Stellacci; f-ino Artemisa da Aranjo; advokato Carlo Domingues; maŝina oficiro L. Pazzaglia; katolika misisto Patro Laan el Nederlando, kiu vojaĝis per « Conte Grande ». En la Universitato de Recife li faris paroladon en Esperanto pri Nederlando, kaj s-ro Domingues tradukis ĝin portugale.

La dua bildo montras la (evidente tre gajajn) gepartoprenantojn de Esperanto-kurso en bulgara vilaĝo Kneja. Entute okazis en Bulgarujo ĝis nun dum la kuranta jaro (1938) jam ĉ. 100 kursoj. La intereso pri nia lingvo tie kreskas kiel neniam antaŭe. Bulgaraj samideanoj petas alilandajn esperantistojn pri kontaktiĝo. Korespondemuloj (preferataj temoj: porpaca laboro, kulturaj demandoj, Esperantismo) sendu siajn adresojn por senpaga publikigo al la redakcio de ĵurnalo « Zarja », Esperanto-fako, Bul. Dondukov 68, Sofia, Bulgarujo.

De kelkaj jaroj apud la universalaj kongresoj estas niaj plej gravaj renkontiĝoj internaciaj la t.n. esperantistaj libertempejoj. Plej konataj tiuj en Danlando (Helsingör, Ry), en la Esperanto-Domo en Arnhem (Nederlando) en la franca marbanurbo Malo kaj en la ĉeĥoslovaka banloko L. Bělohrad. Nia tria bildo montras parton de la kursanoj-libertempuloj en Helsingör, dum kafotrinkado sur la ĝardeno herbejo de la Altlernejo. La kvara bildo prezentas kelkajn danajn gesamideanojn, kiuj vizitis la kursojn en Arnhem, kun nederlandanoj. Komune ili kantas, antaŭ la forveturo de la danoj al ilia hejmlando, la himnon « Holando ĉe mar' ».

La lasta bildo ilustras la sensacian telefonan interparolon esperantlingvan inter Londono kaj Aŭstralio: s-ro Allan Turner parolas el 3 S.R., sendstacio Shepparton (Victoria, Aŭstralio) ĉiun trian dimanĉon monate de 8.45 ĝis 9.00 pri kaj en Esperanto.

La vivipoveco de Esperanto

Tiun pravas la fakto ke, spite de la terura milito ruiniganta Hispanujon, nova esperantista societo floris en tiu lando. Ĝi naskiĝis en Castellterçol, bele situanta vilaĝo sur la montaro, ĉirkaŭita de belaj pejzaĝoj, kun proksimume 4.000 loĝantoj, en la provinco Barcelono, kaj prenis por si la nomon de la somerrestadeja vilaĝo, nominte sin Esperantista Grupo « Castellterçol ». La fondinto de la nova asocio estas nia samideano Rafael Gisbert Garcia, el Barcelono. Li bonŝance tuj trovis tre taŭgajn kaj entuziasmajn kunlaborantojn, kiuj tiel bone kunhelpis la kulturadon de la semita grundo, ke la rikolto ne estis revita promeso sed tuja efektiviĝo. Tion montras la disvolviĝo de la nova societo. Ĝi ĵus naskiĝis, kaj jam konsistas el 85 anoj, gvidas tre ĉeestatan kurson de la helpa lingvo, kaj preparas solenan feston por prezenti sin al la publiko. La antaŭprojekto de la festo estas: ludado de du komedioj, prezentotaj de la teatra sekcio de la grupo, sub la direkto de la artisto Joan Ferrándiz; koncerto, ludota de la amatoroj gefratoj Ciuró; kaj esperanta prelego de Delfi Dalmau. — Gvidas la Esperanto-kurson f-ino Glòria Prunera.

Esperanto en la Lernejo

La 9-an de aŭgusto, ĉe la Supera Komerca Lernejo de Rio de Janeiro, kiun ĉiutage vizitadas pli ol mil ĝelernantoj, okazis solena inaŭguro de kurso de Esperanto direktota de D-ro Everardo Backheuser, universitata profesoro kaj honora prezidanto de Brazila Ligo Esperantista. Ĝin prezidis D-ro Fausto Moreira da Silva, direktoro de la lernejo, kaj ĉeestis Prof. D-ro Mario Brito, direktoro de la Edukada Departemento, D-ro Lafayette Belfort Garcia, direktoro de la Komerca Instruado, ing. J. Carlos Restier Backheuser, lerneja inspektoro, ing. Otavio Martins, edukada teknikisto, diversaj profesoroj kaj estraranoj de Brazila Ligo Esperantista.

D-ro Backheuser faris interesan paroladon kaj rememorigis la kurson, kiun li antaŭ 32 jaroj malformis per la kolonoj de la ĵurnalo « O Paiz ». Poste parolis D-ro Mario Brito kaj la direktoro de la lernejo. Enskribiĝis en la kurson 40 ĝelernantoj.

Korespondado multsignifa

La infanrenkontiĝo en Doorn-Austerlitz.

Amsterdam, 1.3.38: Kara Mileno. Mi kore invitas vin al nia junulara renkontiĝo, kiu okazos en aŭgusto...

Praha, 9.3.38: Kara Lena. Mi tre dankas vin pro la invito. Miaj gepatroj permesis al mi vojaĝi al Nederlando. Mi jam fervore ŝparas...

Amsterdam, 15.6.38: Kara Mileno. La tempo de nia renkontiĝo proksimiĝas. Mi tre ĝojas jam je vi, mia malproksima amikino...

Praha, 30.6.38: Kara Lena. Mi ne venos. Mia patro — laŭ ordono — devis aĉeti por ni gasmaskojn, kiuj kostas po 100 kronoj. Li uzis ankaŭ mian ŝparitan monon. Mi ploris en mia anguleto...

Tamen proksimume 50 esperantistaj infanoj kunestis en kampado sur la belega tereno de la kampcentro Doorn-Austerlitz ĉe Maarn en Nederlando, por la unua infanrenkontiĝo aranĝita de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo. La vasta kaj belega regiono kun sia naturriĉo allogas karesis la infanojn per sia animtrafa ĉarmo. La animstato de la infanoj kvazaŭ en harmonia kunligiteco same sereniĝis en tiu sfero, kiu ne estas precipe nacia sed efektive internacia, tutmonda. Tie parolis la naturo al ĉiuj. Kiel harmoniis en tiu sfero la esperantaj sonoj el infanaj buŝoj! Plenpromesa estas la rezulto de ĉi tiu infanrenkontiĝo. Bedaŭrinde ke ne sukcesis la klopodoj partoprenigi infanojn el ekster Nederlando, — fakto kiun plejparte kaŭzis la streĉita situacio politika. Tamen, dank' al la bonega prizorgo de la ĝegidantoj sub gvido de gek-doj Snel kaj Obbes (profesiaj ĝinstruistoj), la renkontiĝo bonege sukcesis. Proksiman jaron okazos la dua renkontiĝo, espereble pli grand-skale. Por ebligi tion, oni petas jam nun sin turni (el kiel eble plej multaj landoj) al la sekretariino de la infankomitato: A. C. Obbes, Boezemlaan 24-B, Rotterdam (N), Nederlando.

Ni funebras

— Prof. D-ro AKILO TELLINI en Udine (Italujo), konata samideano, kiu de 1901 dediĉis sin fervore al nia afero, subite mortis la 1.10.1938, sekve de kormalsano. La tutmonda esperantistaro konservas al li honoran rememoron.

— La esperantistoj de Verviers (Belgujo) estas forte batitaj de kruela sorto, kiu forrabis du eminentajn samideanojn el ilia rolo:

— S-ro Komandanto FERNAND MONCOU-SIN, Verviers (Belgujo), mortis la 21.8.1938, nur 46-jara. Altestimata oficiro, li estis ankaŭ klera lingvisto kaj posedis maloftan konon en historiaj kaj artaj kampoj. Esperantisto de pli ol 20 jaroj, li prezidis la LKK-on de la Belga Esperanto-Kongreso en Lieĝo en 1930. Post tiu periodo, li loĝis en Verviers; kie lia altranga situacio kaj klera menso ofte kontribuis al la sukceso de niaj propagandaj klopodoj. Nur post kvintaga malsano la morto forrabis lin de kara edzino kaj maljuna patro.

— S-ro IWAN DELHEZ, Verviers (Belgujo), mortis la 25.9.1938. Li estis korespondanto en fremdaj lingvoj kaj apartenis al la grupo jam de 1915. Li estis unu el ĝiaj sekretarioj, kiam ĝi organizis la Belgan Esperanto-Kongreson en 1925, kaj li gvidis plurajn kursojn. Li mortis dum lia sunbanis, okaze de solula ekskurso, tutsola en la dezertaj « Fagnoj », verŝajne pro sangalfluo al la cerbo. Nur 1 1/2 tagojn poste oni trovis lian kadavron. En aĝo de 41 jaroj, li postlasas edzinon kaj tri geknabojn.

La Esperanto-Literaturo kreskas

Knut Hamsun: Victoria. El la norvega tradukis Olav Rygg. 100 p. 13 x 19,5 cm. Prezo broŝ. 2.— norv. kr. Eldonis: Norvega Esperantista Ligo, Oslo. — Mendebila por gld. 1.05 (inkl. sendkostoj) ĉe Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando.

La Nobel-premiita aŭtoro de la « Rikoltaĵoj de l' kampo » (verko alilande konata ankaŭ sub la pli poezia titolo « Beno de l' tero ») estas verkisto, pri kies talentoj kaj verkoj juĝis la plej kompetentaj literaturistoj de nia tempo. Mi do neniel kritikis la grandan verkiston, konfesante ke « Victoria » diversrilate ne estas laŭ mia persona gusto. Mi komencis legi la libron kun granda intereso, sed poste pli ol unu fojon mi ne povis kompreni tiujn homojn — Johannes kaj Victoria, mi preskaŭ eĉ koleris al ili, kaj ankaŭ la fino ne multe plibonigis mian komprenon pri tia psikologio. Aliaj legantoj certe trovos la rakonton belegra kaj ĝian psikologion perfekta. M.

G. F. Wates: De tutmonda perforto al tutmonda frateco. Tradukis W. Bailey L. K. — 128 p. 12,5 x 19 cm. Prezo bind. 3 ŝ. 6 p. Eldonis: E. P. C. Havebla ĉe IEL, Herongate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo, aŭ por 1.95 gld. (inkl. sendkostoj) de Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando.

La teksto, reklamanta tiun ĉi libron sur ĝia ŝirmkovrilo mem, diras:

« La aŭtoro, kiu detempe de sia ekŝiĝo de la civila regnoservo publikigis kelkajn librojn, estas erudiciulo. En la nuna verko li montras, kiel, de la fruaj jarcentoj de Kristanismo ĝis la nuna tempo, perforto malhelpis liberan esprimadon de opinioj pri aferoj religiaj, sociaj, kaj politikaj; ke progresado estas forte obstrukcita de la regado de oficiala aŭtoritato kaj la potenco de riĉeco, kune kun la influo de senracieco kaj kredemeco. Li forte akcentas la bezonon de tolerema sintenado ĉe homoj diversopiniaj, ĉar tio kondukas al klareco de pensado kaj al sento de frateco, tre urĝe bezonataj en la haosaj cirkonstancoj de la nuna mondo. La verko enhavas abundon da historiaj ekzemploj kaj faktoj, konfirmataj per notoj, kiuj ebligas al la legantoj fari personan konstaton. »

La aŭtoro certe trovos (eble jam trovis) pro sia libro multajn aplaudantojn sed ankoraŭ pli multajn kritikantojn. Precipe pri detaloj oni ne ĉie povas konsenti kun li. Certe la klopodoj, veni « de tutmonda perforto al tutmonda frateco », estas ege subtenindaj; sed pri maniero de opinioj grave diferencas.

Jen kelkaj vortoj el la libro, taŭgaj por esperantistoj: « Fido pri la ebleco de progresado kondukas al la volo progresadi kaj kuraĝigas persistadon. Kaj fido kune kun kuraĝo alportos venkon. » M.

J. F. Horrabin: Skizo de ekonomia geografio. Tradukis B. Ross. — 134 p. 14x20 cm., kun 45 entekstaj kartoskizoj. Prezo kart. 20 fr.fk. Eldonis SAT, 67 avenue Gambetta, Paris 20, Francujo.

Interesa kaj ege instrua libro, kies legado estu rekomendata al ĉiu esperantisto senescepte. Ĝi peras bonan komprenon pri la plej gravaj problemoj de l' mondokazado, pri la mondhistorio en ĝia dependo de la ekonomie-geografiaj kondiĉoj. Multaj kartoskizoj ankoraŭ plifaciligas la komprenon. Intermite oni renkontas kelkajn « ne mankeblajn » aludojn politikajn, sed tiuj ĉi aludoj okazas kvazaŭ nur apude kaj ne ĝenas. Pro tio ke la libro aperis unufoje en 1923, oni ŝatus aldonan ĉapitron pri la plej nova periodo, kaj ankaŭ finaludon pri la estonta signifo de aviado kaj de Esperanto.

M.

El Litova Poezio. Tradukis kaj kolektis P. Lapienė. — 198 p. 12 x 19 cm. Prezo broŝ. 3 lidoj, por aliaj landoj la prezo varias inter 0.75 kaj 1.15 ned. guld. — Eldonis: Sakalas. Havebla de Litova Esperanto-Asocio, Zemaĉiu 15, Kaunas, Litovujo.

Litovio estas lando longtempe suferinta sub peza jugo de Carismo. Dum multaj jardekoj eĉ la presado de libroj en litova lingvo estis severe malpermesita, kaj litovoj povis nur kolporte kaj kaŝe akiri litovlingvan literaturon eksterlande presitan. Tamen ekzistas ankaŭ en la litova literaturo talentaj verkistoj, kaj estas la merito de P. Lapienė, ke en ampleksata volumo li alproksimigas ilin al la esperantistaro tutmonda.

La verko enhavas enkonduke koncizan skizon pri la litova poezio, dua parto ampleksas tridekon da popolaj kantoj, kaj en la lasta parto (« Arta poezio ») la plej famaj litovaj poetoj unu post alia defilas antaŭ ni, prezentante specimenojn el sia plumo. Troviĝas inter tiuj poemoj (popolaj kaj artaj) multe da belo. Volonte mi citus al la legantoj de « Heroldo » kaj « Esperanto Internacia » kelkajn precipe belajn perlojn, sed la loko tion ne permesas: ekzemple la popolkanto « Kiam estis mi junulo » (tradukis A. Grabowski), la « monologon de Jogaila » (verkis Balyš Sruoga), « Ho, bela neĝofal' » (Faustas Kirša), « El liberkantoj de l' maro » (T. Tilvytis). Kiel esperantistoj ni povas fieri ke inter la bonfama poetoj litovaj troviĝas ankaŭ la figuro de nia alte ŝatita samideano prelato A. Dambrauskas †, kiu verkis litove sub pseŭdonimo Adomas Jakštas. M.

Edgar Rice Burroughs: Princino de Marso. Tradukis el la usona originalo K.R.C. Sturmer. N-ro 5 de la EPOKO-Libroklubo. — 192 p. 11,5 x 18 cm. Prezo por membroj de la Libroklubo unu angla ŝilingo plus afranko, por nemembroj duobla prezo. Oni povas aliĝi al la Libroklubo ĉe preskaŭ ĉiu esperantista librovendisto, ĉe IEL kaj ĉe Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando (guld. 1.95 por tri sinsekvaj volumoj, inkl. afranko).

Malofte oni legas libron tiom fantazian, — kaj en la komenco estas malfacile alkitimiĝi al tiu fantaziaĵo, pri kies groteskeco oni emas ridi kaj kiun oni volus teni for de sia serioza 1938a jara menso. Sed jam alkitimiĝinte, oni sekvas la aventurojn de l' kapitano Johano Carter kaj de la bela Mars-princino Deja Toris kun pli kaj pli grandiganta intereso kaj streĉo. La libro certe ne estas enuiga, kaj la epizodoj rapide sinsekvas. Impresigemaj legantoj, kaj precipe legantinoj, ne legu ĝin antaŭ endormiĝo: ili suferus inkubegon, songante pri la tri metrojn altaj, teruraspektaj verd-marsanaj militistoj, pri ties okpiedaj « toatoj »-ĉevaloj, pri la ĉevalaltaj « kalotoj »-hundoj kun ransimila kapo kaj tri vicoj da dentegoj, kaj ili jam forgesus en sia sonĝo ke sur « Barsum » (indigena nomo de Marso) ekzistas ankaŭ homsimilaj popoloj. Verdire, la tuta rakonto estas inkubsonĝo songita en ia malluma kaverno de Arizona montaro. Eble nur s-ro Burroughs, la aŭtoro de « Tarzan », kapablis elpensi ion tian. M.

Ni parolu Esperanton. Teksto kaj muziko de Jacques Wolf. Prezo 0.30 gld. Eldonis: N.V. Algemeene Muziekhandel en Uitgeversmaatschappij, van Esso & Co., Rotterdam, Nederlando.

Kantoj apartenas al la plej taŭgaj rimedoj por vigligi grupkunvenojn kaj por entuziasmiĝi la anojn. Ekzistas jam vico da kantoj en Esperanto, sed ankoraŭ ili ne estas multaj. Tial oni salutas ĉiun novan kanton kiu povas varii la repertuaron.

La nova kanto de J. Wolf estas simpla en teksto kaj muziko, iom monotona sed facile ludebla fortepiane. M.

Statistika Resumeto. Ekstraktita el la Brazilia Statistika Jarlibro, Jaro III-1937. Eldonis la Presejo de la Statistika Direktejo de Produktado en Rio de Janeiro, 1938. — 14 p. 18 x 27 cm.

Tiu ĉi resumeto, kiun tradukis s-ro A. Couto Fernandes, prezidanto de Brazilia Ligo Esperantista, prezentas bonegan superrigardon pri la stato de Brazilo; esprimita per ekzaktaj nombroj. Laŭ tio, ekzemple, Brazilo havas etendiĝon nord-sudan de 4317,8 km., kaj orientan-okcidentan de 4334,3 km. La teritoria areo de Brazilo, inkluzive de la Federacia Distrikto, estas 8.512.356 kv. km.; la loĝantaro estas 44.151.231. Da ŝoseoj estas 193.127 km., da fervojoj 33.495,715 km. Ktp.ktp. La interesa broŝuro estas ricevebla senpage.

XX-a Jubilea Kongreso de IKUE: Kongreslibro. 64 + VIII paĝoj, 12,3 x 15 cm. Libreto riĉe ilustrita per tre multaj nigraj kaj kvar multkoloraj bildoj. La nomaro de l' kongresanoj enhavas 208 nomojn. Por 2 resp.-kup. oni povas ricevi la kongreslibron de: Damjan Vahen, Reslova 29, Ljubljana, Jugoslavio.

Ĉinio en Flamo. 20-paĝa eldonajo (13 x 19 cm) kun karikaturaj kaj terurbildoj pri la ĉina-japana milito. Tekstoj en Esperanto. Oni povas ricevi ĝin por unu resp.-kupono de: Mr. Johano H., P.O. Box 116, Canton, Ĉinujo, aŭ de P. v. d. Plank, v. Speijkstr. 48-1, Amsterdam-W., Nederlando.

Esperanto per Briefwisseling (Esperanto per korespondado). Leergang voor beginners. Volledig in vijf lessen. Eldonis Belga Esperanto-Instituto, 127 Lange Leemstraat, Antwerpen, Belgujo. — Kvin lecionoj de po 8 p., 15,5 x 22 cm. Prezo: belg. Fr. 10,—.

Bone ellaborita kurso flandralingva. La enkonduka ĉapitro de ĉiu leciono donas kelkajn dokumentajn klarigojn, tiel ke la kursano ne nur eklernas la lingvon mem, sed ankaŭ povas havigi al si la plej interesajn sciindaĵojn pri la Esperanto-movado kaj pri la problemoj de internacia lingvo ĝenerale. La kurso certe akiros al nia lingvo kaj movado multajn novajn adeptojn.

Kantono sub bombardado de japanaj aviadiloj. Al la Nova Etapo, serio A, n-ro 1. 12 p. kaj kovrilo. Ilustrita raporto pri la bombardoj sur Kantonon kaj aliajn ĉinajn urbojn. Prezo unu resp.-kupono; 50 ekz. 10 angl. ŝil., inkl. sendkostoj. Havebla de la redakcio: P.O. Box 116, Canton, Ĉinujo.

Ph. André Schild: Interlinguistique. Les trois grands projets de langue internationale auxiliaire Esperanto-Ido-Occidental. Grammaire comparée sous forme de tableaux synoptiques et Liste des différences lexicologiques essentielles entre les trois systèmes. — 34 grandformataj, multobligitaj paĝoj. Prezo 2 sv.fk. ĉe la aŭtoro (adreso: Gartenstr. 113, Basel, Svislando).

Petro Kropotkin: Al la junuloj! kaj: Biografio. Traduko el la pola lingvo. — 54 p. 12 x 18 cm. Prezo broŝ. 6 fr.fk. Eldonis SAT, 67 avenue Gambetta, Paris 20, Francujo.

Revenis la longaj vesperoj

kaj kun ili la tempo kiam oni volonte ŝatas legi bonajn librojn. Esperantist(in)o, ĉu vi kelkfoje legas ankaŭ

ESPERANTAN LIBRON?

Lidia Zamenhof :

Letero el Ameriko

(Fino.)

En kelkaj landoj malriĉulo, kiu ne povas aĉeti novan veston, iras en vendejon de malnovaj kaj akiras malnovan mantelon. Amerikano, kiu ne povas aĉeti novan aŭtomobilon (tiaj personoj estas multaj), sed trovas, ke li bezonas propran veturilon (tiaj personoj estas ankoraŭ pli multaj), iras sur placon, kie malnovaj veturiloj, ofte en tute bona stato, atendas aĉetonton, kiu estos pli indulgema, ol la antaŭa mastro, se io en la detalo de la aŭtomobilo ne konformas plu al la lasta modo.

Kaj tiel fluas, fluas tra la stratoj amasego da aŭtomobiloj. Ekzistas kuraĝuloj (ne mi!!!), kiuj penas trabori inter ili sian vojon kaj atingi la kontraŭan irejon de la strato. Ĉiutage morto havas riĉan rikolton sur la stratoj de amerikaj urboj kaj sur la interurbaj vojoj. La homoj, kiuj ne volas tiamaniere riski sian vivon, atentis la trafikajn lumojn.

Trafikaj lumoj, neregule renkontataj en Eŭropo, estas unu el la karakterizaĵoj de la usonaj stratoj kaj vojoj. Ĉe ĉiu, aŭ preskaŭ ĉe ĉiu vojkruciĝo staras altaj fostoj, provizitaj per lanternoj ruĝaj kaj verdaj. La verda koloro signifas: «iru!», la ruĝa — «haltu!». Inter la estingiĝo de unu kaj eklumo de la alia aperas iaforte flava lumo, kiu signifas «atentu!», t.e. estu prudenta, malrapida. Anekdotoj rakontas, ke kandidato je policisto, demandita dum la ekzameno, kion signifas la flava lumo, respondis: « ĝi signifas: rapidegu antaŭen, por ne esti haltigita per lumŝanĝo ». Bedaŭrinde, la anekdotoj ofte montriĝas vero. Kaj tiam aŭdiĝas sur la strato longa, daŭranta signalsono. Ĝi anoncas, ke ruĝakruca aŭtomobilo rapidas al loko de akcidento, aŭ ke polica veturilo rapidas defendi ordon kaj leĝon.

Ordo kaj leĝo ja estas rompataj ĉie. Unu popolo armigas sin kontraŭ alia, unu kaptas la posedaĵojn de alia. Amerikano, al kiu eŭropano riproĉas la kutimojn de la amerikaj gangsteroj, respondas: « Nu, vere, ni havas gangsterojn. Sed ĉu sur aliaj kontinentoj ne regas inter-nacia gansterismo? »

Gangsterojn mi tamen ne renkontis. La peno ne valoris por ili do mi ne povas priskribi iun emociigan aventuron pri forkapto, monpostulo ktp. Apenaŭ iam lernanteto en kurso minacis forkapti mian flavan hundon, se li ne ricevos la ĉokoladon, kiu ekscitadis ĝeneralan intereson kaj apetiton de la Cseh-kursanoj. Min mem neniu forkaptis, kvan-

kam mi aŭtomobilis nokte eĉ en la ĉirkaŭaĵoj de Ĉikago, la urbo de gangsteroj.

Sed mi ne venis en Ĉikagon por konatiĝi kun sinjoro Al Capone. Alia intereso altiris min tien.

En antaŭurbo de Ĉikago, Wilmette, troviĝas impona konstruaĵo, ankoraŭ ne tute finita. De malproksime vidiĝas blanka, punta kupolo, kronanta konstruaĵon tute novan laŭ stilo, naŭflanken, naŭpordegan. Vizitanto, kiu demandas pri la signifo de tiu konstruaĵo, ricevos respondon, kiu sonos kvazaŭ eĥo de iu potenca voko, aŭdita de la homaro en tempoj pasintaj forgesita kaj tial renovigita. Li aŭdos, ke en malproksima Irano aperis Profeto, sendita ne al unu gento, unu nacio aŭ unu religio, sed al la tuta mondo — por fari ĝin unu hejmo, al la tuta homaro — por fari ĝin unu familio.

Ni vivas en tempo senekzempla, sensimila. La homoj kuradas, laŭ la malnova esprimo « tien kaj reen », sed trovas nek eliron, nek rifuĝon. Aperas amase teorioj, skoloj, ismoj; ili akiras rapide amasojn da adeptoj kaj perdas ilin same rapide, ne sukcesinte doni al ili ion kontentigan. Teorioj kaj doktrinoj naskiĝas, vivas la vivon de papilioj kaj malaperas; dume en la antaŭurbo de Ĉikago kreskas, malrapide sed firme, templo senkompara en sia majesteco, grandioza en sia desegno, nova en sia stilo. Estas en ĝi nek orgenoj, nek altaroj, nek pastroj, nek ritoj. Gloro estas tie donata al Dio, kiu sendadis al la homaro Siajn Senditojn en la pasinteco, kaj kiu sendis en ĉi tiu tago novan Parolportanton, por proklami al la mondo la leĝon de amo, la leĝon de unueco. Tiu templo estas la unua Bahaa templo en la okcidento.

Mi estis ankoraŭ nek apud Niagaro, nek en Hollywood. La grandioza akvofalo atendas pacience, ĝis mi havos okazon admirigi ĝian potencon. La deziro iĝi filmstelo forlasis min delonge. Kaj dume en Ameriko en ĉiam pli multaj koroj firmiĝas konvinko, ke la mondo eniras en novan epokon, ke post ĉiaj skuoj kaj batoj eklumos fine por la homaro nova tago. Kaj necesas labori, por ke tiu konvinko kresku. Kaj necesas labori, por ke tiu tago venu.

La usonaj esperantistoj festis sian kongreson en Cleveland. Ho, kiel bravaj, kiel ekzemplaj samideanoj estas meze de la amerika esperantistaro! Kiel modeste kelkaj el ili scias labori, rifuzante brilajn titolojn kaj pacience tirante la ĉaron tra sabloj kaj ŝtonoj. Ameriko ne troviĝas inter la unuaj lan-

doj de Esperantujo. Tio estas simpla, ĉar la lingva problemoj ne estas ĉi tie tiel sentata, kiel en Eŭropo. La laboro de la esperantistoj ofte estas ĉiam ankoraŭ pionira. Sed la amerikanoj scias, kio estas pioniro: homo, kiu iras antaŭen kun hakilo en la mano, hakas vojojn tra virgaj arbaroj kaj plugas novajn kampojn. Kaj la amerikaj samideanoj iras kun hakiloj en la manoj, por haki la murojn de indiferenteco, por plugi la verdan kampon de la homaro, por — apud la stela standardo de Usono — levi alian stelan standardon, la Verdian Standardon.

Marso estas senakva dezerto.

Kiam Marso kaj Tero la lastan fojon ree estis proksimaj unu al la alia, oni uzis la okazon por denove esplori la malnovan Mars-problemon. Oni konstatis, ke ne povas ekzisti « kanaloj » sur Marso, por la simpla kaŭzo, ke Marso tute ne havas akvon. La spektrogramon de la Mars-atmosfero oni esploris tre zorge per la centcola teleskopo de Mount Wilson. Speciale atente oni studadis la ensorbilinojn de akvovaporo. Oni konstatis, ke la lumo de Marso certgrade englutigas de akvovaporo, sed ke tiu absorbado okazas en la atmosfero de la Tero, ne en vaporo de eventuala Marsa atmosfero. La atmosfero de Marso sekve estas tute seka. La pozicio de Marso al Tero ĉi tiun fojon estis oportuna por observado nur de la larĝa ruĝeta ekvatorzono, dum la polusoj ne povis fariĝi objektoj por detala observado. La blankaj « neĝokovriloj » ĉe la polusoj do fariĝas ankoraŭ pli enigmaj.

Sorpoj fariĝas utilaj.

Sorbito, glikozo kemie proksima al sesvalora alkoholo, estas tre bona rimedo por impregni paperon kaj kartonon. La papero, kiun oni prilaboris per sorbito, estas netrapenetrebla kaj samtempe elasta. Ĉar oni povas ricevi sorbiton el la ĝis nun ne tre atentitaj sorpoj, ĉi tiuj havos en estonteco certan signifon.

Postfestmanĝaj paroladoj antaŭfestmanĝaj.

Laŭ usona gazeto «Reader's Digest», okazas en Japanujo la postfestmanĝaj paroladoj a n t a ŭ la manĝado. Tiu kutimo ne nur moderigas la nervozecon de la parolantoj sed ankaŭ limigas la longecon de la paroladoj, ĉar la servado de la manĝo interrompas tedan oratoron.

Ornamajoj el fiŝokuloj.

Post trijara eksperimentado amerikano Gustavo Bohland trovis kemian metodon aliformigi la kristalan lenson de fiŝokulo en malmolan lumantan perlon.

Tra la mondo

Promenado.

Estis tempo, kiam mi ne volis vidi ĵurnalon. La freneza ĉirliĝo en la mondo naŭzis min. Cetere miaj propraj aferoj nebone irantaj postulis mian tutan atenton. Nur ĉe radio — tiam kaj tiam, hazarde, ne intence, inter muzikaĵoj aŭskultataj por distriĝo — mi aŭdis, kio okazas nova sur ĉi tiu stranga pilkego, kiu kun ni flugvojaĝas tra la etero.

Estis ĉiam la samaj tedaĵoj: registaro falis, registaro starigis, devalorigo de mono, borsokraĵo, eltrovita komploto, arestoj, ekzekutoj, akuzoj kontraŭ fremdaj registaroj, laŭdoj al la propra, kvareloj, armadoj, jen informo pri incidento, aŭ akcidento, militeto, vagonaroj kunpuŝiĝis, ŝipo dronis, aeroplano falis, — la tuta vico da tedaj, ĉiam ripetiĝantaj ĉiutagaĵoj, ekscitaj aŭ eĉ funebrigaj por la koncernatoj, sed plej ofte enuigaj por la nekonsernato malproksime de tiuj okazaĵoj. Malofte sporada informo ĝojiga. Nur duone mi aŭskultis. Kaj post la fino de la informoj mi ofte ne plu memoris kion mi estis aŭdinta.

Iutage subite sciigo alarmega. Ĝi povos havi konsekvencojn kiuj tuŝos la pacon de nia kontinento, kiuj rekte tuŝos ankaŭ min. Ne leginte ĵurnalon, ne aŭskultinte eĉ radio-aktualaĵojn dum tuta semajno, mi estis kvazaŭ trafita de tondrobato. La sciigo preskaŭ renversis min. Miaj nervoj ekstrikiĝis.

Feliĉe la afero aranĝiĝis. Ne okazis katastrofo kiu estis timebla dum kelka tempo.

Sed de tiu tempo mi relegas regule la ĵurnalon. Mi konstatis ke estas malpli ekscite, esti preparita iom post iom por ia hiobaĵo, kvankam ankaŭ tio povas esti malagrablega, ol neatendite esti renversita de ĝi.

Tiel ankaŭ la koshmaro de la lastaj septembraj semajnoj, la atendo pri nova militego eŭropa, ne povis tiom paralize influi min, kion faris la antaŭe menciita sciigo neatendita.

Ĉio en la mondo fatale interdependas. Ni mem dependas de la okazado tutmonda. Eĉ kiam ni opinias ke ni estas « distance de la pafo », la bombo facile povos flugi ĝis sur nian domon. Do, ni restu atentemaj.

Ĉe Elbo kaj Danubo.

Ĉirkaŭ la komenca fluo de l' rivero Elbo kaj ĉe nelonga fluparto de la Danubo situas la regionoj, pro kiuj antaŭ kelkaj semajnoj minacis eksplodi nova tuteŭropa aŭ tutmonda milito. La milito ne eksplodis. Pri tio oni ĝojas. Sed tamen, la solvo de la problemoj finfine ne

okazis per nura amika interkonsento. Kaj tio estas la amara gutego en la kaliketo de ĝojo pri la neeksplozo de la milito. La solvon fine tamen eldevisis la perforto, aŭ la minaco per ĝi.

Okazis denove grava ŝanĝo en la landkarto de Eŭropo. Tutaj regionoj ŝanĝis sian mastron. Multloke urboj, vilaĝoj, bienoj ŝanĝis siajn loĝantojn. Popolo volas aliĝi saman popolon. Tio estas la krio de lingvo kaj sango. Sango kaj lingvo estas gravaj faktoroj. Sed ili ne estas ĉio. Ekzistas aliaj faktoroj: geografio, ekonomio, historio, tradicio. Kaj ekzistas ankoraŭ aliaj: simpatio aŭ mal-simpatio, libereco aŭ jugo, esperoj aŭ timoj. Ĉiuj estas konsiderindaj. Kaj estas ankoraŭ la demando pri rajtoj: rajtoj juraj, rajtoj moralaj, rajtoj naciaj, rajtoj homaj, rajtoj nescribitaj; estas multaj aliaj demandoj. Fari justecon en tia kazo estas malfacile, fari absolutan justecon eĉ neeble. Se en 1918, post falo de la aŭstra-hungara monarkio, oni donis pli ol tri milionojn da germanoj, preskaŭ milionon da hungaroj kaj centmilon da poloj al la nove formita ŝtato ĉeĥoslovaka, post la finaranĝo de l' nunaj aferoj restos unu miliono da ĉeĥoj kaj slovakoj, eble pli, en la teritorioj transdonitaj al Germanujo, Polujo, aŭ redonotaj al Hungarujo.

La plej bona solvo estus kooperanta Eŭropo, en kies ĉiuj teritorioj lojala eŭropano — ĉu germano, hungaro, ĉeĥo, polo, ĉu franco, italo, hispano, brito, svedo ktp. — egale trovas hejmon kaj ekzistpermeson; same kiel trovas usonano en ĉiuj ŝtatoj de l' nordamerika konfederacio. Sed ĝis tio estas ankoraŭ longa vojo.

Kiom la neokazigita milito kostis al Eŭropo.

La kostoj de la neokazigita milito estas taksitaj je minimume cent milionoj da anglaj funtoj. Anglujo devis plej profunde enŝovi la manon en la monsakon, ĉar ĝi estis plej malmulte preparita al tia provego; ĝis septembrofino ĝi elspezis ĉ. 45 milionojn da funtoj. Al Italujo la afero kostis relative malmulte, nome ne pli ol 3000 funtojn, ĉar Mussolini ne kredis pri la milit-eksplozo. Germanujo devis elspezi ĉ. 30 milionojn da funtoj, inkluzive de 18 milionoj por la manovroj, 10 milionoj por 270.000 laboristoj ĉe la Siegfried-defendlinio, kaj unu milionon por 250.000 sudetgermanaj rifuĝintoj kaj por la sudetgermana volontula korpuso. Francujo elspezis 12-13 milionojn.

Grandegaj sumoj, per kiuj oni estus povinta krei multe da bono. Kaj, escepte de la ŝtatoj, kiuj ricevis per la mobilizo alkreskon de sia teritorio, tiuj sumoj estas ĵetitaj en la marfaŭkon.

La maljuna Zulu-militisto ploris : « Oni mortpafas miajn plej bonajn amikojn ! »

Korsiraj scenoj okazis en Sudafriko, kiam pro la buŝ- kaj hufmalsana epidemio la aŭtoritatoj devis antaŭgarde mortpafigi milojn da bovinoj, apartenantaj al diversaj vilaĝoj de zulu-kafroj. La mortigo de la zuluaj gregoj fariĝis vera masakro. En la daŭro de kelkaj tagoj estis mortpafataj 7500 bovinoj. Oni pelis la bestojn ĉirkaŭ monteton, por ke iliaj posedantoj ne vidu ilin dum la ekzekuto. Poste forpafis kvin pafistoj, komisiitaj de la registaro, la bovinojn; ĉiu mortigis cent bestojn en unu horo. La kadavrojn oni ŝarĝis sur grandajn traktorojn kaj enterigis ilin en difinita loko.

La zuloj amas siajn bestojn kvazaŭ parencojn. En iu loko maljuna zulu-militisto, kiu antaŭ multaj jaroj estis batalinta kontraŭ la britoj, ekkriis. dum la larmoj ruliĝis trans liajn vangojn : « Tio estas la plej malfeliĉa tago en mia vivo; oni mortpafas miajn plej bonajn amikojn ! »

La registaro kompensas la zulojn pro la perdo, ĉar la brutoj reprezentas preskaŭ la tutan kapitalon de tiuj nigruloj. Ĝis nun oni pagis al ili ĉ. 150.000 sterlingfuntojn.

Nia afero.

Estas bedaŭrinde ke, pro la landkartaj ŝanĝoj en centra Eŭropo, la Esperantomovado perdis denove unu provincon. Germana Esperanto-Ligo en Ĉeĥoslovakio ĉesas ekzisti — estas vere, jam en la lastaj kelkaj jaroj ĝi apenaŭ funkciis, la liga organo delonge ne plu aperis, sed almenaŭ estis en tiuj regionoj ankoraŭ kelkaj individuaj samideanoj kiuj daŭrigis la laboradon. La poloj kaj hungaroj rajtos resti en nia movado, kvankam en Ĉeĥoslovakio la sintenado de la aŭtoritatoj kaj ankaŭ de la publiko estis pli favora al ni ol ĝi estas en Polujo kaj Hungarujo.

Sed ĝenerale, la humoro en la mondo post la ĵusaj okazintaĵoj estas pli favora al ni ol antaŭe. Kiel skribis la redakcio de « Heroldo » en la numero de 16-a de oktobro: « La inkubo estas for, la koroj de l' homoj ĉiulandaj estas, post tiuj semajnoj timteruraj, pli akceptemaj por nia afero. Urĝe uzu la tempon kiu restas ĝis la vintraj kursoj ! » Jes, urĝe uzu ĝin! Ek!

Zigzag.

Kie kaj kiel oni faras Porto-vinon


— Ĉu Porton ? —

Jen vortoj aŭdeblaj ĉie ajn je la fino de bona vespermanĝo.

Porto-vino ! Kiu ne konas tiun vinon tiel prave faman ? !

Sed certe nur malmultaj scias, kie kaj kiel oni preparas ĝin. Jen, do, la kialo de tiu ĉi artikolo.

Porto-vino, la portugala altkvalita vino, estas tiel nomata, ĉar oni eksportas ĝin precipe el urbo Porto, ĉe la enfluejo de rivero Doŭro, sur kies bordoj kreskas senfinaj vinberujoj produktantaj ĝin.



Tiel estas alportataj la vinberoj al la premejoj; la viroj, surhavante plenajn korbojn, marŝas en longaj vicoj, laŭtakte de harmonikoj kaj trianguloj.



La barkoj, « rabeloj », glitas laŭlonge de la rivero Doŭro, kun bareloj de Porto-vino.

Tiu regiono, en la norda Portugalujo, estas montplena, kun tre profundaj valoj, kie fluas rapide Doŭro kaj ties alfluriveroj. Geologie la regiono estas skisteca, kaj tial la grundoj estas gruzplenaj pro la diserigado de la skistoj. Tio korektas la troon de argilo de la tero kiu estas ankaŭ riĉa je potaso kaj, kontraŭe, tre malhava je kalko, azoto kaj organikaj substancoj. Klimate oni povas diri ke ĝi estas varma kaj seka, ĉirkaŭita de aliaj regionoj malvarmaj kaj pluvemaj.

Tie, sur la krutaj kaj ŝtonplenaj deklivoj, oni kulturas vinberojn de tre malsamaj specoj. Tiu malsimileco de specoj karakterizas la vinberkulturon ĉe Doŭro, kiu tiel diferencas de la aliaj vinberregionoj portugala kaj fremdaj, kie ĉiam superregas iu aŭ alia speco.

Ni lernu nun la procedojn tie uzatajn en la vinfarado, tute ne sekretajn, kiel oni emus kredi. Tiu bonega produkto devenas de la noblaj kvalitoj de la vinberoj de regiono kun tiel nekutimaj ecoj, sed ne de farmaniero nekonata en aliaj lokoj.

Kiam la vinberoj estas jam tute maturaj, komence de oktobro aŭ, ofte, je la fino de septembro, okazas la vinberrikolto. El la najbaraj provincoj venas aroj da viroj kaj virinoj por tiu laboro,

kio estas festo. Ne estas plu senlaboruloj : la virinoj, la gemaljunuloj, la geknaboj rikoltas la vinberojn en korbetojn, forigante la putrajn kaj la kontuzitajn, kaj malplenigas ilin poste en aliajn, pli grandajn korbojn, kiujn la viroj alportas sur la dorso al la premejoj, vastaj kvarangulaj basenoj el granito. Tien ili ŝutas la vinberojn, ofte nur post forpreno de la rekremento, kvankam ne ĉiam oni faras ĉi tion.

Kiam la premejo estas plena, kelkaj viroj, kun suprenfalditaj pantalonoj kaj bone lavitaj kruroj kaj piedoj, eniras en

ĝin, kaj, brakon en brako, komencas marŝi, laŭtakte de harmonikoj, tien kaj reen, premante la vinberojn. Post du horoj ili haltas, malligas sin kaj daŭrigas pisti la vinberojn je malorda promeno tra la premigejo.

Kaj ĉiam, kaj ĉie, harmonikoj kaj gitaroj, trianguloj kaj tamburoj laŭte sonoras. Virinaj voĉoj, viraj voĉoj enmiksas sin por gajaj kantoj. Laborplenaj tagoj kiuj estas festotagoj, tiuj de la vinberrikolto !

Post la unua premado, kiu daŭras dum la nokto, oni permesas ke la mosto kaj la viroj iom ripozu, ĝis la sekvanta tago, kiam la procedo rekomenciĝas, per la kruroj, aŭ helpe de premiloj.

Dum la fermentado okazas, oni zorge rigardas la mostpezilon por scii, kiam oni devas malfermi la premejon kaj pasigi la likvaĵon en la barelegon, kie ĝi estos « kovata ». Tiu ago bezonas atenton, ĉar ĝi okazigas ke la vino estu pli aŭ malpli dolĉa. Vere, la mosto, kiu eliras el la premejo, kunmiksiĝas en la barelo kun iom da vina brando, kiu ĉesigas ĝian fermentadon kaj malpermesas la solviĝon de la restanta sukero.

La vino, tiel preparata, nur post kelke da jaroj estos Porto-vino. Tial preskaŭ ĉiu vinkulturisto ĝin vendas ankoraŭ junan al la komercistoj en Gaja, ĉe Por-

to, kiuj ĝin prizorgas, « lotumas » kaj atendas ĝian maljuniĝon, por fine ĝin eksporti, en bareloj aŭ boteloj, ĉiuflanke en la mondo.

Por alporti la barelojn al Gaja, oni utiligas precipe riveron Doŭro, rapide fluantan tra la regiono kiu produktas la vinon. Per ĉaroj, tirataj de fortaj bovoj, oni ilin alportas ĝis la rivero, kie ili estas enmetataj en barkojn, kiuj laŭlonge de la rivero glitas senpene malgraŭ la abundaj rapidfluejoj, ĉar ili estas speciale konstruitaj por tie navigacii. Tiuj barkoj — tielnomataj « rabeloj » — havas platan kilon kaj strangforman velon, kaj ilia direktilo — la « espadelo » — estas longa kaj forta stango, kiu funkcias kiel interfiksa levilo, kies apogpunkto estas la paŭpo. Nuntempe la vino estas ankaŭ sendata al tiu urbeto per la fervojo, kiu trairas la regionon flanke de la rivero.

En la tenejoj de Gaja la vino estas prilaborata dum ok jaroj aŭ eĉ pli, sed de tiam la ŝatantoj jam povas ĝin trinki plezure, ĉar jam ĝi havas la koloron, la guston kaj la odoron de bona Porto-vino. Poste oni ankoraŭ devas « lotumi » ĝin por konservi la specojn. Tial, estas en Gaja specialaj profesiuloj, la gustumistoj, kiuj, krom havi tre distingokapablajn flaradon kaj gustumon, devas esti fortikaj viroj, por povi toleri tian provon, kiu alimaniere ilin malsanigus. Kiam tiuj ĉi sinjoroj fine aprobas la vinon, tiam ĝi estas sendata al ĉiuj landoj de la mondo kaj tie plezurplene trinkata.

Kaj, ĉu vi scias kiel trinki ĝin ?

Trinki ne estas gluti. Tiu, kiu scias trinki, scias ĝui ĉiujn plezurojn de la vino : la koloron, kaj tial li ĝin trinkas el kristalglaso; la odoron, kaj por tio li pasigas sub la naztruoj la glason, kiu devas havi konvenan tulipformon kaj esti nur duonplenigita per la vino; — kaj nur post tiuj ceremonioj li alproksimigas la glason al la lipoj por gustumi la nektaron. Li sorbetas iom da vino, rondirigas ĝin en la buŝo sur ĉiuj gustumiloj, kaj nur poste li glutas ĝin. Estas tiam la plej grava momento, kiam tiu bonega vino al li donas mirindan aron da dolĉaj kaj harmoniaj sensacioj.

J. Bigotte d'Almeida.

3130 militjaroj kontraŭ 227 jaroj de paco.

La gazeto « Popolo d'Italia » faris interesan kalkulon, laŭ kiu estas konstatite: De post 1496 a.K. ĝis 1861 p.K. estis nur 227 jaroj, dum kiuj regis paco, sed dum 3130 jaroj oni militis. Sekve : Dum la tempo de 3357 jaroj la homaro por unu paca jaro militis dektri jarojn !


En la lastaj tri jardekoj en Eŭropo estis 286 militoj.

Tiuj ĉi ciferoj parolas por si mem.

Malofta dokumento de Reĝo Sadasiva de Vyayanagara trovita en Nederlando

Antaŭ kelkaj jaroj nia samideano, s-ro H. Hasenbos el Eindhoven (Nederlando), sukcesis propriigi al si dokumenton, kiu konsistas el kvin bronzaĵaj platoj, kunigitaj per sigelo-ornamita ringo. Tiun dokumenton trovis katolika misiisto, eble okaze de fosado en la ĉirkaŭaĵo de Bellary Vyayanagara (Brita Hindujo), kaj poste ĝin alportis al Nederlando. Li denove estis de siaj superuloj sendata

S-ro Hasenbos denove skribis al la Brita Muzeo, petante, ke oni, se eble, donu kelkajn klarigojn pri la teksto de la dokumento. Tiam la direktoro respondis, ke li serĉu kontakton kun specialisto pri la lingvo, en kiu la teksto estas redaktita. La posedanto poste korespondis kun kelkaj famaj profesoroj kaj muzeoj, ekz.: s-ro Jean Capart, ĉef-konservisto de la reĝa Belga Akademio en



al sia misio, kaj la dokumento restis ĉe liaj parencoj. La misiisto intencis disponi pri la dokumento post sia reveno al la patrolando, sed tiun planon li ne povis efektiviĝi. Alveninte en la misiejo, li malsaniĝis kaj mortis. Sekve de tio la parencoj restis nesciantaj pri la signifo de la dokumento.

S-ro Hasenbos hazarde eksciis pri ĝia ekzistado, kaj post kelkaj intertraktadoj la dokumento fariĝis lia posedaĵo.

La nova posedanto tiam korespondis kun la Brita Muzeo en Londono, de kie li baldaŭ ricevis jenan komunikon:

Departemento de Orientaj presaĵoj.

Brita Muzeo, Londono.

424/34.

30 aprilo 1934.

Sinjoro,

Vian leteron de la 25-a de ĉi tiu monato mi ricevis. Via dokumento estas landdonaco, farita de Sadasiva, la lasta reĝo de la tria aŭ Tuluva dinastio de Vyayanagara, kiu regis de 1542 ĝis 1567 A.D. Ĝia teksto estas gravurita en sanskrita lingvo en Nandi-nagari'a skribado, kaj rilatas donacon al iu, verŝajne Bramano aŭ Bramanoj.

(subskr.) G.D. Bawett, arkivisto.

Buselo; la direktoro ĝenerala de la Arkeologia Muzeo de Hindujo, Daya Ram Sahni, en Simla; s-ro Coomaraswamy, direktoro de la registara muzeo en Boston (Mass.); s-ro Ramachandran, help-arkeologiisto ĉe la registara muzeo en Madras; kaj alia scienculo opiniis esti vera surprizo, ke troviĝas tia dokumento en Nederlando: « maloftaĵo, kies valoro estas tre malfacile taksebla ». La direktoro ĝenerala de la arkeologio en Hindujo petis permeson por tradukiĝi kaj aperigi la tekston en « Epigraphia Indica »

La dokumento konsistas el kvin bronzaĵaj platoj, kunigitaj per ringo kun reĝa sigelo (*Boar Seal*). La alteco de la platoj estas 27 cm, larĝeco 18,5 cm, dikeco 4 mm, diametro de la sigelo 8 cm. Pezo de la tuta dokumento estas 5,25 kg. Materialo: bronzo. Platoj n-ro 1 kaj 5 estas gravuritaj unuflanke, la aliaj platoj ambaŭflanke. Laŭ komunikoj de kompetentuloj tiu ĉi ekzemplero estas la sola dokumento de ĉi tiu reĝo, kiu troviĝas en privata posedaĵo.

Eventualajn informojn volonte donas: H. Hasenbos, Lakerstraat 16, Eindhoven (Nederlando).

Monda Semajna Manifestacio kontraŭ Kancero

La Internacia Unio kontraŭ Kancero, kies direktoro pri propagando estas s-ro Tomarkin, 18 Rue Soufflot, Parizo V, Franclando, arigas 92 instancojn el 53 nacioj.

Ĝia celo estas starigi konstantan ligiton inter la instancoj de ĉiuj landoj, kiuj dediĉas sin al la scienca studado pri kancero kaj al la lukto sociala kontraŭ tiu plago.

Post apenaŭ tri jaroj da klopodoj, la Unio povas esti fiera pri la jenaj realigoj:

1. Publikigado de ok dikaj volumoj nomitaj: « ACTA » publikitaj en la daŭro de du jaroj.

2. Kreado de la Internacia Komisiono pri Statistiko rilata al malsanigeo kaj mortokvanto per kancero.

3. Organizo de la unua Internacia Kongreso pri Scienca kaj Sociala Lukto kontraŭ Kancero (Bruxelles, Belglando, 1936). La dua Kongreso estas okazonta dum 1939, en Nov-Jorko.

4. Kreado de la Komisiono pri Klasifikado anatomia kaj klinika de la Tumoroj.

5. Publikigado de atlaso pri Diagnozo de la Tumoroj.

Laŭ impulso de tiu grava Asocio, ĉiuj anaj landoj organizas, sur sia propra teritorio, grandan manifestacion kiu okazos por ĉiuj de la 23-a ĝis la 30-a de novembro 1938.

Dum tiu periodo, ĉiuj instancoj kongigos al ĉiuj homoj ke ili devas ekzameni sin pri kancero por ke neniu sekundo estu perdita, ĉar tiu gravega malsano estas kuracebla nur, se ĝi estas konita de la unua momento.

Por subteni la kontraŭkanceran movadon festoj estos organizitaj, kies profito iros al la Internacia Centro; teatro deprenos parton de la enkasigitaj sumoj por doni ĉu al la lokaj organizoj, ĉu al la Internacia Centro.

La lukto kontraŭ kancero ne estas sufiĉe vigle subtenata de la registaroj.

Neniu povus supozi ke la nura prezo de iu el la plej gravaj militŝipoj permesus pagi la elspezojn de 10 gravaj Institutoj pri serĉado **dum unu jarcento!** Kaj ke la elspezoj necesaj por la ĝenerala servo de iu el la amerikaj militŝipoj estas tiom altaj, kiom estas la elspezoj necesaj por daŭrigi ĉiujn Institutojn pri kancero el la mondo.

Tamen, unu el naŭ personoj estas destinata por morti pro kancero.

Ni esperas ke ĉiuj geesperantistoj agos vigle favore de la manifestacioj de sia propra lando, aŭ de la lando, en kiu ili vivadas, por ke tiu agado, same kiel Esperanto, venku!

Impresoj orientaj :

La „warong”

La « warong'oj » estas por la indiĝena popolo, kio estas en Eŭropo la restoracioj aŭ kafejoj. Ne imagu ke ili estas luksaj kaj blindigas la okulojn per siaj brilantaj nikelaj kafujoj, ke kelneroj vestitaj en nigra vestaĵo servas al vi la manĝon sur arĝentsimila plado ! Vi eraros.

Ili estas sen ĉio kio eĉ malproksime similas komforton.

Kelkaj subteniloj, sur kiuj kuŝas tabuloj, tegmento el tolaĵo aŭ plektitaj folioj de iu palmarbo, — jen la konstruaĵo.

Ĉirkaŭe kelkaj benkoj. Jen ĉio.

Kiom ajn modestaj ili estu, tamen ili ludas grandan rolon en la hindia *) socio.

Kie granda arbo ĵetas sian ombregon sur la ŝoseon, vi povas trovi la « warong ». Ĝi ne estas firme lokita. Ĝi sekvas la trafikon, kiel hundo sekvas la karavanon. Hodiaŭ ĉe festo, morgaŭ ĉe foiro, postmorgaŭ ĉe tombejo.

Ĉar ankaŭ ĝia klientaro venas de ĉie. La kulio, kiu eble du tagojn marŝadis el sia malproksima vilaĝo ie en la montaro por serĉi ian laboron en la granda urbo, trovante ĝin sur sia vojo, ripozas tie.

Li estas laca, polvokovrita, la ĉion broganta suno tiris la lastan guton da suko el lia korpo. La warong estas por li kvazaŭ oazo en dezerto.

Li estas nur « orang bodok » (homo kiu ne scias multon), kaj tie ĉi li povas informiĝi pri la vivado en la ĉirkaŭaĵo. Ĉar ĉi tie, kie alfluas la novaĵoj el ĉiuj direktoj — kiel en la telegrafejo alvenas la fadenoj kiuj kontaktigas kun la tuta lando —, li povas aŭdi, ĉu en la suda parto la « padi » (rizo) baldaŭ maturiĝos, ĉu en la urbo oni multe konstruas, aŭ ĉu la ŝipriparejo bezonas homojn.

Li ne estas postulema. Ĉar egalanime li laboras kiel falĉisto dum la rikolto aŭ kiel masonisto ĉe grandaj konstruaĵoj, kvankam li ne scias diferencigi brikon de cemento. La vivo instruis al li ke « orang ketjil » (homo kiu ne havas grandan influon) devas akcepti la vivon tia kia ĝi altrudas sin al li. Li do adaptiĝas. Tutan sian havaĵon li portas, kunligita en tukon, ĉe la koksoj.

Kaj kiam li estas trovinta laboron, ree estas la warong kiu liveras lian porvivon. Lia budĝeto ampleksas je cendoj. Tagmeze li aĉetas por du cendoj kelkajn fruktojn kiuj sufiĉas al li. Vespere li denove estas tie. Sed nun lia manĝo estas pli luksa. Manpleno da kuirita rizo kun spicita saŭco kaj rostita kokaĵo, kiu dum sia vivo eble jam konatiĝis kun Noah, estas regalo por li.

*) T.e. en Nederlanda Hindujo.

Kun li estas multaj aliaj, vaguloj kiel li. Ifoje li tie konatiĝas kun virino, kaj ambaŭ pasigas la nokton « sub la bela stelo ». La postan tagon ili disiras : li al iu nedefinita celo, — ŝi por serĉi laboron kiel kuirstino aŭ servistino —, sen iu ajn kortuŝo : « ŝipoj kiuj pasas en la nokto ».

Mi amas vin, warong.

Ĉu mi ne trovis ĉiam bonan akcepton ĉe vi ? Kiam tutan tagon mi fiŝkaptis laŭlonge de la marbordo, aŭ dum la nokto ĉasante sovaĝajn porkojn, surprizite de la pluvego, kiu falis torente, mi serĉis rifuĝon, — jam de malproksime min allogis la briletanta lumo de via « lampoe templek » (petrollampo ne havanta vitran tubon).

Kaj kian abundon da allogaĵoj vi enhavas ! Ĉu ni elektu teleron da « soto » (supo de legomoj) aŭ kvankon da « sate » (pecetoj da viando pikitaj sur lignaj splitoj kvazaŭ najloj, kiujn oni rostas kaj servas kun tre spicita saŭco) ? Ĝi ne estis la aĉa el la urboj, kie oni vendas ĝin farita el kokaĵo, aŭ — kio estas ankoraŭ pli fripona — el hundajo, sed la vera, la gloro de via lando — la ĉie fama « sate kambing » (viando de kapro).

Ho ve, mia kara warong ! Mi ne havas ledan stomakon kiel viaj vizitantoj. Mi kontentiĝas nur per taso da kafo. Sed kia kafo ! Via « kopi soldadoe » (nigra kafo sen aldono) ! Mi povis vidi ĝian pretigon. Vi ne muelis ĝin. Vi pistis ĝin ! kaj poste metis kelkajn kulerojn da pistaĵo en tason da varma akvo — sen iu ajn aldono.

Pro tio ĝi ja estas « kopi soldadoe ». Mi trinkis kafon kaj manĝis kafon samtempe. Sed kion vi volas ? « *A la guerre comme à la guerre !* »

Mi ne scias, ĉu vi iam dormas ; ĉar je kiu ajn horo mi preteriris vin — ĉu nokte, ĉu tage, ĉu en la mezo de la tago kiam eĉ la naturo ŝajnas endormiĝi —, ĉiam vi kvazaŭ invitas la preteriranton.

Vi havas la vivon eternan.

J.H.A. Sens.

Laŭ melodio amata :

Karl Vanselow:

Nina

(Laŭ itala kanto, melodio de G.B. Pergolesi.)

Tri tagojn mia Nia
El dormo senfina
La dolĉ-okulojn du
Jam ne malfermis plu.

Tri tagojn mian plendon
Kaj ploran atendon
Ŝi en ĉi tiu mond'
Jam lasas sen respond'.

Najbaroj, helpu kaj venu vi,
Venu al ŝi kun fluto
Kaj harpo kaj liuto
Kaj kanta melodi',
Por ke vekigu ŝi.

Rido sanigas

Pri aŭtomobiloj.

— Kiel vi sukcesis sanigi vian edzinon de ŝia pasio por antikvaĵoj?

— Okaze de ŝia naskiĝofesto mi donacis al ŝi aŭtomobilon el la jaro 1900.

★

— Ĉu vi refoje aĉetis aŭtomobilon?

— Jes, mi devis foje telefoni. Por tiu celo mi eniris aŭtobutikon. Nu, kaj mi ne povis ja eliri ne aĉetinte ion.

★

Amiko vizitas amikon, kiun li trovas bandaĝita en la lito:

— Kio okazis al vi?

— Aŭtomobila akcidento.

— Sed mi ne sciis ke vi posedis aŭtomobilon!

— Ne mi, — la alia ĝin havis.

★

— Sed, sinjoro, se ja estas la celo de via registaro, ke en via lando estu po unu aŭtomobilo por ĉiuj tri personoj, kial do vi konstruas tiun ĉi popol-aŭtomobilon por kvar personoj?

★

Karlo kaj Petro preteriras starejon por aŭtomobiloj, kiu estas preskaŭ plene okupita.

Diras Karlo: — Mi dezirus havi la monon, kiu estas pagita por ĉiuj ĉi aŭtomobiloj. Tio estus bela kapitalo.

Respondas Petro, kiu estas pli vivosperta: — Mi dezirus sole havi tiun monon, kiu ankoraŭ devas esti pagota por ili...

Ruza irlandano.

Anglo kaj irlandano iam vetis, kiu el ili sciopovas naĝi plej malproksimen.

La fiksitan tagon venis la irlandano, vestita per naĝkostumo, kaj portis sur la dorso grandan sakon. La anglo demandis, kio estas en la sako.

« Manĝaĵo por tri tagoj », respondis Pat, la irlandano, kun bagatela mangesto.

« Vi gajnis la veton », nun diris la timigita anglo kaj donis al li la monon.

Post kelkaj tagoj li aŭdis, ke Pat entute ne scipovas naĝi.

Inter edzoj.

— Mia edzino ne havas dezirojn.

— Nek mia: ŝi nur havas ordonojn.

Ĉe la doktoro.

Kuracisto: Vi devas ĉiutage tri horojn promeni.

Paciento: Ĉu mi devos tion fari antaŭ aŭ post miaj deĵor-iradoj? Mi nome estas leterportisto.

Bona rentumo.

— Por la edukado de mia filino mi elspezis cent mil frankojn, kaj nun ŝi edziniĝis al homo kiu nur havas jar-enspezon de kvin mil!

— Tio do estas kvin procentoj; en la nuna tempo kontentiga rentumo, mi pensas.

Neelĉerpebla fonto.

— De kio vi vivas?

— De miaj du kolomboj.

— Kiamaniere tio povas esti?

— Mi vendas ilin matene, kaj vespere ili revenas.

La kaŭzo de la distreco.

Sinjorino: Sed, Katrinjo, kie troviĝas la kaŭzo de via distreco?

Servistino: Ĉe la tria kompanio, sinjorino.

Jen!

Unua aktoro: Kia estas via rolo en la nova teatraĵo? Ĉu vi devas multe paroli?

Dua aktoro: Ne, ĉar mi ludas la edzon.

LA ESPERANTISTA REKLAMO

La prezo de anoncetoj

estas egalvaloro de 10 belgaj frankoj aŭ 0.60 ned. guldeno, por la unuaj 20 vortoj aŭ mallongigoj; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj 5 belgaj frankoj aŭ 0.30 guldeno. La anoncetoj aperas en la semajna kaj (laŭ la disponebla loko) monata organo de Internacia Esperanto-Ligo, nome en « Heroldo de Esperanto » kaj « Esperanto Internacia ». Por mendi anoncetojn, oni turnu sin al la Administracio de **Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; nederlanda poŝtĝiro 1306.30 ('s-Gravenhage); belga poŝtĝiro 2044.04 (Bruxelles).**

Naskiĝo Froding. La 2.9. naskiĝis al ges-roj Karl Froding en **Rockford** (Illinois), Usono, fileto nomita Ray Robert. — Koran gratulon!

Fianĉiĝo. La 16.7.1938 gefianĉiĝis f-ino Anna M. van der Graaf, anino de la Esperanto-societo « Merkurio » en **Rotterdam** (Nederlando), kaj s-ro Stewart J. Bruce, ano de la Centra Esperanto-Klubo de **Sheffield** kaj de la Londona Esperanto-Klubo (Britujo). — Ni kore gratulas.

Letervesperon aranĝos la 8-an de decembro 1938: Reading Esperantista Societo. Respondon garantias: Sekr. W. T. Allen, 379 London Road, **Reading**, Anglujo. — Skribu letere aŭ poŝtkarte, ni petas, kaj helpu nin propagandi nian lingvon!

Letervesperon aranĝos Klubo Esperantista de Malmö, Kamregatan 3, **Malmö**, Svedlando, la 8-an de novembro. Ni atendas multajn kartojn kaj leterojn. Almenaŭ unufoja respondo garantiata. Skribu multnombre!

Taggazetoj pri la ĵus-okazintaj (Godesberg, München ktp.)! Por organizo de speciala ekspozicio, la Societo Franca por Propagando de Esperanto deziras ricevi unu numeron de ia ajn taggazeto de la 25-a aŭ 28-a aŭ 30-a de septembro 1938, el diversaj landoj kaj lingvoj. Rekompenco per sendo de numero de « Franca Esperantisto ». Sendu al SFPE, 34 Rue de Chabrol, **Paris 10**, Francujo.

« **El Verdavalo** ». — Progresintoj kaj komencantoj same ĝuos la rakontojn kaj artikolojn, interesajn kaj amuzajn, pri homoj kaj bestoj de Borneo kaj aliaj aziaj landoj, en « El Verdavalo », n-roj 1 ĝis 3. Tri bone presitaj libretoj, po 16-paĝaj, tre favore recenzitaj en nia gazetar. Unu numero kostas 2 internaciajn respond-kuponojn; la tri jam aperintaj numeroj por 5 kuponoj. — Kursgvidantoj! Jen neordinara legaĵo, bona sed malkara, por viaj kursanoj. Provu! — Mendu de R. F. Vaughan, **Sandakan**, B.N. Borneo. (518)

Perfektigi en nia lingvo estas la deziro de ĉiu samideano. Tre taŭga libro por tio estas la « Internacia gramatiko » de Leopold Kitzler, kiu estas verkita ekskluzive en Esperanto. Prezo guld. 1.20, inkl. sendkostoj, ĉe la esperantistaj librovendejoj aŭ ĉe la Librofako de Heroldo de Esperanto, **Scheveningen, Nederlando.** (544)

Nekatolikoj senpage povas ricevi informojn pri la katolika kredo ĉe la « Internacia Katolika Informejo », Fraterhuis, de Vliert, **'s-Hertogenbosch**, Nederlando. (526)

Nederlando: S-ro N. Zilver, Zach. Jansstraat 53, **Amsterdam**, deziras poŝtmarkojn kaj bildkartojn el aliaj landoj (Centra Eŭropo nur laŭdezire). (529)

Sendu vian foton, adreson kaj profesion! Vi tuj ricevos grandan kolektaĵon da fotografajoj kun adresoj el 18 landoj **senpage.** Fot. A. Indrulic, **Laizuva**, Litovujo. (542)

Senpage publikigas adresojn de geknaboj, kiuj deziras korespondi, la monata infangazeto « La Vojo ». Adreso Redakcio: Marathonweg 15, II., **Amsterdam**, Nederlando. (453)

Interŝanĝi poŝtmarkojn aŭ ilustritajn poŝtkartojn deziras J. van der Kley, instruisto, Ambtstraat 137, **Almelo**, Nederlando.

18-jara sveda tipografo volas korespondi kun samaĝaj eksterlandanoj. Skribu al Carl-Erik Eliason, Stålgatan 15, **Halmstad**, Svedlando.

Itala esperantisto deziras interŝanĝi belajn poŝtmarkojn. Respondo certa. — R. Giorgis, Via Genova 76, **Torino 128**, Italujo.

Sveda fraŭlo tre deziras interŝanĝi leterojn, poŝtkartojn kaj fotografajojn kun gesamideanoj ĉiulandaj. S-ro Hilmer Ottoson, **Blaiken**, Svedlando.

Filatelistoj el Azio! Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, mi ĉiam certe respondas. Mia adreso: Mladen Vrtunski, Drzavna svilara, **Novi Sad**, Jugoslavio.

Filatelistoj el Afriko kaj Aŭstralio! Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, certe respondas. Mia adreso: Mileva Matešić, Drzavna svilara, **Novi Sad**, Jugoslavio.

F-ino Augusta Aertgeerts, Pensionaat, **Borsbeek (Antwerpen)**, Belgujo, deziras korespondi kun esperantistoj el ĉiuj mondpartoj.

Gesamideanoj vojaĝantaj! Eksterlandaj vizitontoj de nia ĉefurbo estas petataj, ke ili anoncu ĝustatempe sian alvenon al Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko, Truhlářská 16, **Praha II**, Ĉsl. La oficisto de nia oficejo estos je via dispono kaj helpos vin dum via restado en Praha. Faru tion en via propra intereso! — Turisma Komisiono.

Ni deziras helpi! Esperantista lernejestrino de granda popollernejo en Anglujo havas gelnantojn, kiuj multe deziras sendi helpon al gelnantojn en afliktitaj distriktoj de Ĉeĥoslovakio. Bonvolu skribi al: F-ino Waite, 13 Vernon Road, **Birmingham 16**, Anglujo.

Kiu ĝojigos soldaton? Petata estas alsendo de rulfilmo (6 x 9), ĉar en Hispanio dum la milito ĝi estas malfacile akirebla. Mi rekompencos per alsendo de fotoj de la hispana milito. Ĉu vi havas pecon da ĉokolado? — Francisko Haiderer, S.R.J. — 21 A., **Valencia**, Hispanio.

Kiu povas helpi? Hungara esperantisto, ne-arjo, 24-jara, ĉapelisto perfekte konanta sian metion, posedanta kelkajn specialaĵojn de la fako (laboris dum sep jaroj en unu fabriko), provizore restanta en Francujo, deziras iri **ekster Eŭropon**, ĉar en Eŭropo ne ekzistas por li labor-ebleco. Li estas preta fari kian ajn laboron. Li tre petas skribi al li laŭ jena adreso: St. L., ĉe s-ro L. Zinner, 7 rue Gassendi, **Paris 14**, Francujo.

Germana esperantisto, de post 1919 en la movado, 52-jara, petas laboron eksterlande (ne en Italujo, Japanujo, Portugalujo). Li preferus laboron kiel helpanto en ia ajn misio-stacio aŭ kiel telegrafisto. Se tio ne estus ebla, li ankaŭ farus aliajn laborojn. — W.D. per IEL, Herongate, **Rickmansworth (Herts.)**, Anglujo.

Policistoj! Mi deziras korespondi kun kolegoj en ĉiuj landoj. Vitmar, ŝtata policisto, **Ringkøbing**, Danlando.

Urĝe bezonata: ekzemplero nova aŭ uzita de « La Venecia Komercesto »! Skribu al: L. Richardson, 9 Osborne Gardenas, **Monkseaton**, Northumberland, Anglujo.

Samideanoj! Ni deziras korespondi kaj interŝanĝi leterojn, poŝtmarkojn, poŝtkartojn, gazetojn kun la tuta mondo. Certe respondas. S-ro Albert Johansson, Töppgatan 6, II, **Södertälje**, Svedlando, kaj s-ro Folke Tidblom, Floragatan 13, **Södertälje**, Svedlando.

Svedo deziras korespondi kun samideanoj en ĉiuj landoj por ŝanĝi poŝtmarkojn. Certe respondas. S-ro Curth W. Johansson, Skolagatan 46, **Norrköping**, Svedlando.

Danujo: S-ro Damskov, **Faaborg**, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj bildkartojn el aliaj landoj. Mi deziras ankaŭ ĝeneralan korespondadon.

Orienta Kulturo, kvaronjara ĵurnalo, enhavas aktualajn artikolojn pri orientaj problemoj. Specimeno kostas unu respondkuponon internacian. Societo de Orienta Kulturo, Komagome-Dozaka 228, **Tokio**, Japanujo.

19-jara fraŭlo deziras korespondi kun ĉiuj landoj. S-ro Strid, Ångturbin, **Saltsjö-Järfa**, Svedlando.

Poŝtmark-interŝanĝo kun ĉiuj landoj, kvanto por kvanto, aŭ kataloge. Certe respondos. Artur David, Zemaljska banka, **Sarajevo (Bosnio)**, Jugoslavio. (545)

Atentu! « Konversacia Esperantista Klubo », **Kopenhago**, Stenosgade 7, St., Danlando, aranĝas **letervesperon la 3-an de novembro**. Ni tre petas interesajn leterojn, poŝtkartojn aŭ Esperantaĵojn. Respondo garantiata.

Kvakerismo kaj Paco. Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (Esperanta kaj angla) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, **London N.W. 1**, Anglujo. (432)

« **Fragmentoj** », originala verko, legenda por ĉiu esperantisto. Havebla de B. Ojasson, Haimre vlm. pk. 11, **Märjamaa**, Estonujo. — Prezo 1.— sv. fk. (548)

Filatelistoj, atentu! Kontraŭ ricevo de unu nederlanda guldeno aŭ egalvaloro mi sendos serion da poŝtmarkoj, kiu aperos okaze de la 50-a datreveno de la unua vagonaro en Bulgarijo. — Mi vendas aliajn poŝtmarkojn, serie kaj aparte. Mi respondas al ĉiu kiu sendas respondkuponon. — Librejo « D-ro Zamenhof », **Asenovgrad**, Bulgarujo. (549)

Kiu entreprenos? Mi posedas tradukitan verkon de fama Nobel-premiito Henryk Sienkiewicz: « Sur hela bordo »; 80 pĝ. Kiu helpus al mi presigi ĝin? Afable kun ofertoj turnu vin al s-ro Adolfo Oberrotman, Krochmalna 43, **Warszawa**, Pollando.

Esperantaĵojn kaj malnovajn Esperantajn gazetojn mi sendos kontraŭ uzitaj poŝtmarkoj. — Prof. Elio Migliorini, Via A. Poerio 33, **Roma**, Italujo.

Sendu al mi poŝtmarkojn de via lando, kaj interŝanĝe vi ricevos la saman kvanton da svedaj markoj. Respondo garantiata. S-ro Werner Lindqvist, Dammgatan 17, **Oskarshamn**, Svedujo.

Presejo de Belga Esperanto-Instituto K. S. Antverpeno — Belgujo.

